

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Aurora Bute

Luiza Carol

Probal Dasgupta

Emmanuel Desbrières

Liba Gabalda

Ronald Glossop

Mireille Grosjean

Huang Yinbao

Mónika Molnár

Radojica Petrović

Xing Qishuang

Zhang Changsheng



ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN):	3
Mireille GROSJEAN: <i>50-a ILEI-Kongreso: Konkluda raporto de la prezidanto</i>	4
<i>Kongresa rezolucio - Rezulto de la Internacia Pedagogia FilmFestivalo (M.G.)</i>	8
<i>Impresoj pri ILEI-kongreso</i> (XING Qishuang, Liba GABALDA, Aurora BUTE)	10
<i>ILEI aktivas dum la UK: Tago de la Lernado</i> (Mireille GROSJEAN)	16
<i>Simpozio - Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj HUFUS, UK Seulo 2017</i>	17
Mireille GROSJEAN: <i>Esperanto instruado-edukado en tutmonda skalo</i>	18
Ronald GLOSSOP: <i>Pri la organizaĵo „Infanoj Ĉirkaŭ La Mondo”</i>	22
Probal DASGUPTA: <i>Lerni pri la historio, en kiu hejmas niaj vizitatoj</i>	25
Mónika MOLNÁR: <i>Freinet-pedagogio – Parto I: La teorio de la praktiko</i>	27
Luiza CAROL: <i>Bezonatas krea adaptiĝemo</i>	31
Luiza CAROL - Mirejo GROSJEAN: <i>Dek jaroj en Esperanto-lando</i>	32
El la landoj kaj sekcioj (CN, FR, RS)	34
<i>Al niaj 41 sekcioj</i> (Mireille GROSJEAN).....	39
<i>La Kongreso finiĝis – ek al la Kongreso</i> (Radojica PETROVIĈ)	40
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj	41

ESTRARO DE LA LIGO

- Prezidanto:** Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Rilatoj kun UNESKO kaj FIPLV. Observanto de ILEI ĉe UEA. Informado al ekstero. Ekzamenoj.
- Vicprez.:** GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitata agado.
- Sekretario:** Emile MALANDA NIANGA. P. O. BOX 2787 Cape Town 8000, Sud-Afriko. <emalandan@yahoo.fr>, <ilei.sekretario@gmail.com>. Kontakto kun sekcioj. Koleghelpa Kaso.
- Vicsekr.:** Elena NADIKOVA. ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio. Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>. Lerneja agado. Eo-centroj.
- Estrarano pri financoj:** William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.
- Estrarano:** Radojica PETROVIĈ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Kongresoj de ILEI, rilatoj kun TEJO, retaj aferoj, „Interkulturo”.
- Estrarano:** Ivan COLLING. Cx.P. 1701, Ag. Mal. Deodoro, Curitiba, PR. BR-80011-970, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Universitata agado.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono,
Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio,
Università degli Studi di Roma
„La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute,
Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio,
Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Ilona Koutny, Pollando/
Hungario, Uniwersytet im.
Adama Mickiewicza w
Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного
Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: grupo de kongresanoj antaŭ budhisma templo dum ekskurso.

Dorskovrile: fotokompilaĵo de Liba kaj Floreal Gabalda pri Busano (vd. p. 12)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Laŭ la nombro de partoprenantoj, laŭ la nombro de programeroj, laŭ la nombro de artaj prezentoj, laŭ la nombro de pladoj okaze de la frandvespero, laŭ la nombro de pladoj dum bongustega bankedo, laŭ la tri raportoj, kiujn vi povos legi en tiu ĉi revuo, nia 50-a KONGRESO estis sukcesa. Plie la temo „Edukado al respektplena turismo” estis kaj restas inspira, ĉar turismo estas unu el la ebloj por ni esperantistoj uzi la lingvon en fremdaj landoj kun nekonataj homoj.

Kongreso ĉiam estas okazo por la Komitato kunveni, kunsidi, interparoli, analizi la vivon de la Ligo kaj fine decidi pri farendaj paŝoj. Eĉ se la elektado de la estraro okazos en 2018, la decidoj de la jaro 2017 estas gravaj: ili ĉefe koncernas nian organon **INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO**, kiu suferis je paneoj en la dissendo kaj nun nepre devas alveni regule, ligi nin al vi, karaj membroj, kaj informi vin detale kaj valore. Nia revuo estos ekde nun printita en Martin, Slovakio, danke al la perado de Stano Marček, kiu prizorgas nian duan revuon **JUNA AMIKO**. Ŝanĝoj okazos ekde 1.1.2018, vi membroj ĝuos rabaton por aboni nian duan revuon JA!! En la numero 2017/4 ni detale informos vin pri la finaj decidoj, kiujn la Komitato lasis al la Estraro. Do **nepre legu nian organon IPR**, ĝi estas nemalhavebla ligo inter vi kaj la Ligo!

La enhavo de tiu ĉi numero raportas multon pri la juliaj eventoj en Koreio, sed plie ĝi alportas diversajn sciigojn, kiuj tutcerte interesos vin. Ni deziras al vi agrablan legadon!

Mireille GROSJEAN
Prezidanto de ILEI

KONKLUDA RAPORTO DE LA PREZIDANTO

Konstato: 206 personoj aliĝis, 170 alvenis. La kialo estas la streĉita politika situacio tutmonda, kun du ŝtatestroj aparte ne antaŭvideblaj. Pro tio kelkaj personoj rezignis kaj aliaj ne ricevis vizon. Ni menciuj aparte la ĉinan klason de Neĝeta, grupon de 15 infanoj, por kiuj ni planis la infanan universitaton, kiu finfine ne okazis. Ok afrikanoj aliĝis kaj ne povis veni.

La vojaĝo por la partoprenantoj kaj ĉefe por eŭropanoj estis longa kaj kosta. Pro tio ili volis malkovri la regionon kaj multe ekskursis. Tion mi bone povas kompreni. La sekvo de tio estas, ke malmulte da personoj partoprenis la kursojn kaj la prelegojn. Ĉu pro la fakto, ke la temo estis turismo, la kongresanoj pli turismumis ol kongresumis...?

La junulargastejo ARPINA, dek-etaĝa plej moderna konstruaĵo, ebligis komunan restadon tage kaj nokte. Tio estas tre favora situacio kaj stimulas bonan etoson kaj efikan laboron. La ĉambroj estis tre komfortaj, eĉ luksaj. La uzo de la tegmenta etaĝo, la oka, faris de ni ok-ulojn. Tie estis eĉ surtegmenta teraso kun belega rigardo al la maro; la kuraĝuloj iris tien kaj devis elteni la varmecon kaj humidecon. Ni havis 3 ĝis 4 salonojn, larĝan koridoron por la libroservo, la akceptejo, la kaso kaj koridoraj babiladoj. Unu granda salono kun eblo dividiĝi en du ricevis la nomon de la forpasinta LEE Chong Yeong, fama kaj altnivela korea esperantisto, eks-prezidanto de UEA kaj iniciatinto de la Esperanto-versio de la manlibro pri Historio „*Historio por malfermi estontecon*”, kiu prezentas detale la Historion de orienta Azio en la unua duono de la dudeka jarcento. En la dua etaĝo estas tre granda salono, kie okazis la frandvespero (interkona vespero kun alportitaj frandaĵoj el la devenlandoj de la partoprenantoj), la malfermo kaj la nacia vespero.

La kongresa temo estis „*Edukado al respektolena turismo*”. La ampleksa enkonduka prelego de Mireille GROSJEAN traktis la temon detale. (*Vidu la retpaĝon ilei.info*) La ludo Bafa Bafa en ĵaŭdo ebligis al partoprenantoj turismumi al alia etno en apuda salono kaj konatiĝi kun fremda kulturo, spertante surprizojn, kulturŝokon, adaptiĝon.

Du novaj programeroj aperis en tiu ĉi kongreso. La unua estas la *Pedagogia Foiro*. Laŭ mi ĝi estis sukcesa. Ses prelegoj okazis kaj donis la okazon al certaj personoj prezenti instrumaterialon, vortaron, novan lernolibron, la projekton *Unu Leciono Pri E-o por Ĉiu Lerneĵano*. Ĉiuj dokumentoj pri tiu projekto, inkluzive la dokumentojn pri *Krozado tra la Lingvoj*, troviĝas en la retejo de ILEI ĉe: ilei.info/agado/projektoj.php

La dua estas la *Literatura Kafejo*. Mireille GROSJEAN prezentis du svisajn librojn, kiuj estis tradukitaj al E-o: *Sonoril' Urĉjo* (de Chönz la teksto kaj Carigiet la bildoj), kies originalo estas en la romanĉa lingvo, kaj *La Birdo*, de Eveline PORTER, kiu aperis en dulingva eldono: angla kaj Esperanto. La originalo estas en la franca. Menciindas, ke Svisa Esperanto-Societo (SES) jam eldonis en Esperanto la faman libron *Heidi* de Johanna SPYRI. Rob MOERBEEK prezentis verkon de Frederik VAN EEDEN, nederlanda verkisto.

La kutimaj kursoj okazis: kurso por komencantoj sub la gvido de Annie GRENTE. Kurso por progresantoj sub la gvido de Sylvain LELARGE. La Instruista Trejnado, grava kaj kerna parto de tia kongreso, estis en la lertaj manoj de Katalin KOVÁTS. Ok personoj ricevis atestilon pri Instruista Trejnado post frekventado de ĉiuj kvar sesioj.



Prelegoj okazis kaj konsistigis la fakan programon por tiuj kongresanoj, kiuj ne membras en la Komitato nek volas sekvi la supre menciitajn kursojn. La prelegoj sekvis pli aŭ malpli la kongresan temon pri turismo. Aurora BUTE, Marija BELOŠEVIĆ, Rob MOERBEEK parolis. Mireille GROSJEAN prezentis fotoriĉan raporton pri sia vizito ĉe la limo en la vilaĝo Panmunjom en 2008, kie ŝi povis viziti la svisan taĉmenton, kiu laboras tie nome de Unuiĝintaj Nacioj. Nia Lingva Festivalo okazis en eksterordinara loko: la Palaco de la Internacia Pusan-FilmFestivalo. Mirinda arkitekturo grandioza (*vidu foton supre*). Sub ŝvebanta tegmento dancis folkloro grupo



meze de la tabloj por niaj multaj lingvoj. Kompreneble preterpasantoj venis kaj diskutis kun la membroj de nia ekzota grupo. Kelkaj kongresanoj surhavis nacian kostumon. „Krozado tra la lingvoj”, prelego de Mireille GROSJEAN, estis fakte enkonduko al la *Lingva Festivalo*. La Komitato kunsidis kaj atingis kvorumon danke al reta voĉdono antaŭa, kiu

donis permeson al iuj komitatanoj anstataŭi komitatanojn de aliaj sekcioj. De la estraro ĉeestis la prezidanto Mireille GROSJEAN, la vic-prezidanto GONG Xiaofeng „Arko” kaj la vic-sekretario Elena NADIKOVA, nur 3 membroj, 3 virinoj. (Vidu foton supre, kun la prezidanto de LKK „Nema”). La Komitato elektis du novajn Honorajn Membrojn, nome la forpasintan Paul GUBBINS el Britio kaj HU Guozhu el Ĉinio. La Komitato aprobis la agadraporton kaj la finanĉan raporton kaj farante tion senŝarĝigas la estraron. Aperis sugestoj por altigi la nombron de abonantoj al *Juna Amiko*. Maniero fari tion estus proponi rabaton al niaj membroj. La Komitato decidis tion kaj nun la estraro devas konkretigi la proponon. Tute nova oferto aperos en aŭtuno kaj ekvalidos je 1.1.2018.


Pluraj duontagaj ekskursoj okazis dum la semajno. Du tuttagaj ekskursoj okazis merkrede. Per buso 50 kongresanoj iris al Gyeongju kaj al la antikva templo Bulguksa (vidu foton). Ili havis la okazon restadi, mediti kaj manĝi en budhisma templo.

La Loka Kongresa Komitato (LKK) elstare kaj efike laboris. Nia sud-korea sekciestro Sinjoro PARK „Nema” gvidis la laboron per lertaj manoj kaj altnivelaj sociaj kapabloj. Menciindas la elstara kontribuo de Sinjoro Monto, unu el la membroj de la 11-persona LKK. Li havas muzikgrupon kaj konas aliajn muzikgrupojn kaj folklorajn grupojn. Li organizis, ke en ĉiu programero aperis iom da korea muziko: dum la frandvespero, dum la malfermo, okaze de la nacia vespero kompreneble, dum la lingva festivalo sur granda placo. Danke al tio nia kongreso akiris



viglecon kaj gajecon. Ĉiu kongresano ricevis belan ventumilon memore al la Zamenhof-Jaro (*vidu foton*).

La bankedo okazis en fora restoracio, kiun la kongresanoj atingis per buso. Denove la busananoj fariĝis busanoj. Aŭdiĝis jena komento: la bankedo estis la plej sukcesa kompare kun diversaj aliaj dumkongresaj bankedoj, ĝi estas abunda kaj bongusta, belaspekta kaj originala. Plie (kelkaj manĝantoj eĉ ne rimarkis tion) vegetarana.



Kiam ni parolas pri instruado, ni pensas pri transdono de konoj kaj de kapabloj, klarigoj, ekzercoj... Tra la **Jaro de la Lernanto** la Ligo ILEI klopodis montri la gravecon de respondeca lernado de la studento kaj nova akompana rolo de la instruisto. En Busano ni aŭdis la vortojn *instigo* kaj *emocioj*. La kunvivado de instruisto kaj lernantoj havas ankaŭ tiajn flankojn, kiujn ni devas priatenti.

La konkluda parolado de la prezidanto okazis vendrede inter la 16-a kaj la 18-a horoj. Sekvis je la 20-a horo triparta prezento de la iberia duoninsulo, terlango okcidente en Eŭropo, kie ILEI havos sian kongreson en 2018: en Madrido. La UK okazos post la ILEI-kongreso en Lisbono, Portugalio. Mireille Grosjean prezentis la ĝeneralan situacion de Iberio, ĝiajn montojn, insulojn kaj politikajn limojn. (*Vidu la ilustraĵon sekvapaĝe.*)

Sekvis Prof. Duncan Charters, kiu doktoriĝis pri Hispanio kaj hispanaj literaturo kaj lingvo. Li prezentis rapidan skizon de la Historio de tiu mondoparto kun akcento sur la postmezepoka tempo, kiam tie floris elstara kulturo kreita per miksitaj kontribuoj de kristanoj, judoj kaj islamanoj. Sekvis prelegeto de Ruben FERNANDEZ ASENSION el Barcelono, Katalunio. Li prezentis la nuntempan koleron de katalunoj pro la diskriminacio farata de kastilianoj, la reganta etno en centra Hispanio. Per faktoj kaj analizoj li montris la nunan situacion. Ni povis kompreni, ke niaj gazetoj en la tuta mondo aŭdas la voĉon de Madrido, kie la ĵurnalistoj laboras, pli ol de Barcelono, eĉ se tiu urbo ludas pezan ekonomian rolon en la tuta duoninsulo.

Ĉiuj partoprenantoj esprimis sin pozitive pri ĉi tiu kongreso. Neniu granda aŭ grava paneo okazis.



Ĉio evoluis kontentige, eĉ bele kaj fruktodone. Enketo okazis post nia Konferenco en Hungario, ĝi ripetigis post Busano.

Sabate matene, la 22-an de julio, la buso startis je la sepa horo por atingi Seulon je tagmezo. Je la naŭa horo startis du pliaj busoj por porti homojn al la UK.

*Mireille GROSJEAN
Prez. de ILEI*

50-a Kongreso de ILEI – Busano, Koreio, julio 2017

KONGRESA REZOLUCIO

La 170 partoprenantoj el 25 landoj de Azio, Eŭropo kaj Ameriko en la jubilea, 50-a Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI, okazanta de la 15-a ĝis la 22-a de Julio 2017 en la junulgastejo ARPINA en Busano, Korea Respubliko,

DISKUTINTE la temon „Edukado al respektoplena turismo”,

REMEMORIGAS, ke la agentejo de Unuiĝintaj Nacioj pri Turismo UNWTO substrekis la valoron de Esperanto en sia deklaro de Manilo, ĉefurbo de Filipinoj, de la jaro 1980:

„La Monda Organizaĵo pri Turismo substrekas la gravecon koni lingvojn, aparte lingvojn kun universala aspiro kiel Esperanto.”

ATENTIGAS pri la rolo de la neŭtrala lingvo Esperanto por senperaj interhomaj kontaktoj prepare al, dum kaj reage al personaj aŭ etgrupaj turismaj vizitoj ĉe surlokaj individuaj loĝantoj kaj specife fakuloj, kiuj kontaktoj firmigas daŭrajn internaciajn amikecojn kaj interklerigajn interŝanĝojn en ĉiam pli vastaj rondoj;

ATENTIGAS tiurilate pri la ĵus renovigita UNESKO-kuriero, kies Esperanto-versio donas taŭgan materialon por la daŭrigaj Esperanto-kursoj post la jam amasaj komenckursoj en Interreto, kiel tiu de Duolingo; en kiu kuriero unu artikolo pri plonĝistinoj de la insulo Jeju memorigas pri teksto en la „Korea Antologio de Noveloj” (1999 kaj 2017), kio evidentigas la gravecon de prepara literaturostudo antaŭ la turismado;

REKOMENDAS, ke kolegoj kunlaboru en la tradukado, utiligo kaj komentado de la UNESKO-kuriero nun disponebla en la Internacia Lingvo Esperanto;

REMEMORIGAS, ke la celado de Unuiĝintaj Nacioj, UNESKO kaj la Esperanto-movado baziĝas sur la komuna bezono konstrui pacan mondon surbaze de homaj rajtoj kaj strebado al daŭripova evoluo kun respekto al la Tero kun ĉiuj ĝiaj naturaĵoj.

Busano, la 21-an de julio 2017

Rezulto de la Internacia Pedagogia FilmFestivalo de ILEI (IPEFF) okaze de la Jaro de la Lernanto

Alvenis al ILEI kvar filmetoj. Ili iris al internacia ĵurio, kie membris tri profesiaj filmistoj kaj kvar ŝatantoj de filmoj kaj amatoraj filmistoj. Du profesiaj filmistoj ne estas esperantistoj.

Jen la rezultoj:

La unua premio, 200 EUR uzotaj por partopreni internacian kongreson kiel IJK aŭ UK aŭ ILEI-kongeson, iras al KANG Caiqi, de El Popola Ĉinio, por ŝia filmo „Esperanto nia lingvo” en la kategorio „interkultura harmonio”.

La dua premio, 100 EUR uzotaj por partopreni internacian kongreson kiel IJK aŭ UK aŭ ILEI-kongreson, iras al QUI Jieming kaj ZHENG Kexin, de Ĉina Radio Internacia, kiuj kune muntis du filmetojn. Gajnis la filmo „Printempa Festo 2” en la kategorio „interkultura harmonio”. Ili devos inter si dividi la premion.

Okaze de la 50-a kongreso de ILEI en Busano la 19-an de julio 2017 la kongresanoj donis la premion de la publiko, kiu estos diplomo, al la filmo „Fenestro al la mondo” de XIE Ruifeng, de El Popola Ĉinio, en la kategorio „interkultura harmonio”.

ILEI kreis kanalon ĉe *Youtube* kaj metis tien la 4 filmetojn. La filmetoj videblas tie: [youtube.com/channel/UCvxZ3qhmQcFKzTGCR_SLHFg](https://www.youtube.com/channel/UCvxZ3qhmQcFKzTGCR_SLHFg).

Oni povas konstati, ke kvar personoj partoprenis kaj ĉiuj kvar ricevas premion.

Mireille GROSJEAN

Impresoj pri ILEI-kongreso

1.

de XING Qishuang (Susi) (Ĉinio)



Dank’ al la helpo de Profesoro GONG Xiaofeng „Arko” kaj ILEI, mi havis ŝancon partopreni la 50-an kongreson de ILEI en Busan en julio 2017. Dum la kongreso, multaj valoraj aktivadoj okazis. Ĉiuj estis brilaj kaj signifoplenaj. Kiel instruisto de elementa lernejo, mi ege nutris min el la aktivadoj. La plej profundaj impresoj ĉe mi estas sekvantaj.

Mi vere ŝatas la lecionojn de Sylvain LELARGE pri lingvokapablo.

Li estas eminenta kaj humura instruisto. Li eksplikis lernadon de vortoj komparante tion al promeno en fruktoĝardeno. Oni promenas inter diversaj fruktaj arboj kaj elektas tiujn fruktojn, kiujn oni ŝatas. Estas fruktoj sur la tero, sed ili eble ne

estas puraj, eble jam estas morditaj de insektoj. Tiajn fruktojn oni ne ŝatas. Estas fruktoj pendantaj alte sur branĉoj. Oni ege ŝatas ilin, ĉar ili aspektas vere bongustaj! Sed neniel oni sukcesas preni ilin. Estas fruktoj ne tiel altaj sur arboj, do oni povus pluki ilin etendante la brakon. Sam-maniere ni studas vortojn. Ni devas elekti tiujn, kiuj estas nek sur la tero, nek tro altaj sur branĉoj. La metaforon tuj mi komprenis. Kvankam mi povas esprimi ideon per simplaj vortoj, tamen mi devas studi plu por pli bone esprimi min. Aliflanke, la tro komplikajn vortojn lasu aŭ atendu, ĝis via kapablo altiĝos. Sylvain ankaŭ donis kelkajn ekzercojn por studi vortojn. La plej ŝatata de mi estas la sekva: ĉiuj partoprenantoj de la ekzerco gajnas du vortojn, kiuj estas similaj, ekzemple „akcento” kaj „akĉento”; oni salutas alian kaj demandas „Ĉu vi konas miajn vortojn?”. Se jes, la respondanto klarigos pri la vortoj; se ne, la demandanto klarigos. Post kiam ambaŭ personoj bone lernis la vortojn, ili interŝanĝos la vortojn kaj iros al alia homo por daŭrigi la ekzercon. Ankaŭ aliaj manieroj estas interesaj. Sylvain ankaŭ instruis kanton al ni. Mi tre ŝatas la kanton „Nove, reprove, ĉiam denove... Se falante, restarante: tiel ni venkos! ...”

En trejnado Katalin Kováts instruis al ni kiel organizi instruadon.

Mi instruas Esperanton en elementa lernejo. Miaj lernantoj estas komencantoj kaj ankaŭ estas junaj infanoj. Mi ĉiam provas trovi pli bonan kaj taŭgan manieron por la infanoj, por ke ili ŝatu kaj bone studu la lingvon. La maniero de Katalin donis al mi inspiron. Ŝi grupigis kursanojn duope el malsamaj landoj. En grupo oni demandas unu pri la alia kaj memoras informojn de la grupano. Poste Katalin demandas kursanon „Kion vi scias pri via grupano, inkluzive de la nomo, aĝo, lando, hobia ktp”. Tiamaniere la partoprenantoj ne nur prezentas sin mem, sed ankaŭ la alian grupanon. Tiel lernantoj pli multe ekzercas kun pli granda intereso. Pro la kurso de Katalin mi komprenas, ke instruistoj devas pensi laŭ la starpunkto de la lernantoj anstataŭ laŭ tiu de la instruanto. Interagado inter lernantoj estas pli grava ol tiu inter lernantoj kaj instruanto. Mi devas vigligi miajn lernantojn estigante plian interagadon inter ili. Tio estas pli grava ol mia entuziasmo. Nur lecionoj, en kiuj lernantoj estas aktivaj, estas vere viglaj.

Leciono de Annie GRENTE por komencantoj:

Mi partoprenis la lecionon de Annie. Miaopinie la plej studinda afero por mi estas la kapableco alĝustigi lecionon. Annie povas bone alĝustigi sian planon laŭ la reago de lernantoj. Instruistoj devas posedi tian kapablon, ĉar ni neniam povas antaŭvidi ĉion, kio okazos dum lecionoj. Se io neatendita okazas, ni bezonas fari alĝustigon.

Krom studado estas ankaŭ amuzaj aktivadoj en la ILEI-kongreso. Mi ege ĝuis ilin. Tiaj aktivadoj inkludis lingvo-festivalon, internacian vesperon, adiaŭan vesperon, bankedon, ekskurson ktp.

Dum la lingvo-festivalo, la kongresanoj el diversaj landoj prezentis siajn landon, lingvon kaj ankaŭ Esperanto-movadon. Multaj preterpasantoj interesiĝis pri nia movado, ili demandis kaj iomete lernis pri diversaj naciaj lingvoj. Samtempe ili ekkonis Esperanton. Ni diris, ke ĉinoj parolas ĉine, francoj parolas france, sed ni esperantistoj el la tuta mondo parolas Esperante.

En la frandvespero ni ĝuis tradician kantojn kaj dancojn, kaj gustumis specialan manĝaĵon de diversaj landoj. Korea esperantistino akompanis min promeni ĉe la maro, butikumi en magazeno, babilante trinki kafon kiel en harmonia familio.

La tagoj en la ĉi-jara ILEI-kongreso estas mirinda kaj neforgesebla sperto por mi. Pere de la ILEI-kongreso mi ne nur travivis eksterlandan vivon, sed ankaŭ pli bone komprenas la ideon de Esperanto. Do, karaj neesperantistoj, ne demandu min, kiom da homoj el kiu lando parolas E-on. Mi nur volas diri, ke ni esperantistoj povas vidi pli belan mondon.

2.

de Liba GABALDA (Francio)

Meze de julio, ILEI malfermis la serion de tri Esperantaj kongresoj en Koreio. Post ĝi sekvis la 102-a UK en Seulo kaj tuj poste la 90-a SAT-kongreso en la apuda urbo Gimpo. La kongreso de ILEI okazis de la 15-a ĝis la 22-a de julio en la dua plej granda urbo en Koreio, Busan, situanta en la suda parto de la lando. Fakte la kongreso estas la unua kun tiu ĉi nomo. La decido estis prenita pasintjare en *Nyíregyháza*. Antaŭe temis pri ILEI-konferencoj. La kongreson partoprenis 170 gesamideanoj el 21 landoj. La akcepto estis varma, same kiel la lando mem. Ni loĝis en komfortaj ĉambroj de la junulara gastejo *Arpina*. Ĉiuj programeroj okazis en la oka etaĝo de la konstruaĵo. La temo de la ĉi-jara kongreso estis: „Edukado al Respektplena Turismo”. Ĝi estis plenumita per kelkaj prelegoj kaj kompreneble per ekskursoj al interesaj lokoj.

Sabate, dum la interkona vespero, ni gustumis ĉefe aziajn kaj kelkajn alilandajn frandaĵojn. Koreaj esperantistoj dume prezentis belegan folkloran programon kun specifaj dancoj kaj muziko de sia kulturo. Krom variaj prezentadoj ni ĝuis gruo- kaj masko-dancojn. Dimanĉe okazis la solena inaŭguro kun ĉeesto de kelkaj reprezentantoj de la urbo Busan. La

prezidantino de ILEI, Mireille GROSJEAN, bonvenigis la kongresanojn. Estis legataj kelkaj bondezir-mesaĝoj. Dum la paŭzo ni aŭskultis specialajn koreajn muzikilojn. Sekvis salutoj de reprezentantoj de ĉeestantaj landoj kaj la prezidantino konigis al ni la kongresan temon pri turismo. Post la malfermo de la kongreso ni komune fotiĝis.

Estis enkondukitaj novaj programeroj: „Pedagogia foiro” kaj „Literatura kafejo”. Tiucele estis prezentitaj kelkaj libroj kaj paroladoj pri diversaj temoj. La Nacia vespero mirigis ĉiujn ĉeestantojn. Ni ĝuis variajn prezentadojn de la korea folklorokulturo. Subtila estis *Dongrae* – la gruodanco, konata jam de la unua vespero.

La semajna programo inkluzivis kurson de E-o por komencantoj gvidatan de Annie Grente, progresantoj ĝuis viglan kaj amuzan kurson de Sylvain LELARGE kaj la instruistan trejnadon estris Katalin KOVÁTS. La fidelaj partoprenantoj ricevis atestilon. Ne mankis lernado de la korea lingvo eksprese sub gvido de PARK Yongsung (Nema). Kun Mireille ni krozadis tra la lingvoj. Oni diskutis pri la maniero enkonduki Esperanton en lernejojn. Ĝis nun oni vane strebis pri tio. Tamen, ni estas esperantistoj, do ni devas esperi... En aliaj programeroj oni parolis pri gramatikaj tiklaĵoj, pri centroj de E-o kaj pri privataj projektoj. Komitatanoj plenumis sian laboron dum pluraj kunsidoj kaj ankaŭ estis pritraktita la temo „Jaro de la Lernanto”.

Sur la urba placo, antaŭ la teatro okazis lingva festivalo kun 16 lingvoj inkluzive Esperanton prezentataj de la kongresanoj. Por la publiko, kiu bedaŭrinde ne abundis, estis aranĝita speciala kultura programo.

Ni spektis kvar filmetojn el filmokonkurso okaze de la Jaro de la Lernanto. Ni aljuĝis al unu el ili la premion de la publiko. Rilate al la temo pri turismo oni parolis pri la fama mondvojaĝanto kaj verkisto Tibor Sekelj. Marija BELOŜEVIĈ parolis pri pozitivaj kaj negativaj efikoj de turismo. Aurora BUTE, vestita en bela rumana kostumo, parolis pri kulturaj specifajoj de Rumanio. Sur la prezentitaj bildoj ni povis admiri preĝejojn pentritajn ankaŭ sur la eksteraj muroj. La rumana bluzo inspiris plurajn famajn modistojn. Kortuŝa estis la rakonto pri „Miljara Animo” (Koryo te-bovlo). Rob MOERBEEK prezentis korean literaturon. Interesa estis la ludo „Bafa-Bafa”, en kiu temis pri konfronto de du malsamaj kulturoj.

Tre bongusta kaj enhavoriĉa estis la kongresa bankedo en urba restoracio. Ĝi kontentigis ĉiujn ĉeestantojn per varia elekto de koreaj specialaj manĝaĵoj. Al kongresanoj estis proponitaj pluraj duontagaj ekskursoj por malkovri la ĉirkaŭaĵon. Unu el la tuttagaj ekskursoj estis destinita al vizito de la urbocentro de Busan. Alia tuttaga ekskurso celis la regionon de Gyeongju, kie ni vizitis antikvajn tombojn. Unu el ili estis

enrigardebla. Sekvis vizito de monaĥejo, kie ni tagmanĝis kaj plonĝis en meditado. Impresa estis vizito al la templo Bulguksa, mondheredaĵo de Unesko.

Ĉe la fino de la kongreso estis prezentita la Iberia duoninsulo, kie okazos venontjare la 51-a ILEI-kongreso en la hispana ĉefurbo Madrido de la 21-a ĝis la 28-a de julio. La portugala ĉefurbo Lisbono gastigos la 103-an UK-on tuj poste. Mireille GROSJEAN prezentis konkludan paroladon pri la kongreso kaj la Rezolucio. Sekvis dankoj kaj gratuloj al busanaj esperantistoj, kiuj sukcesis organizi belegan kongreson. Tiele plenumiĝis la bondeziroj de urbaj reprezentantoj eldiritaj ĉe la inaŭguro. Ni ĝuis vigran kaj agrablan semajnon.

3.

de Aurora BUTE (Rumanio)

Ĉi-jare la plej grava aranĝo de ILEI, la 50-a Kongreso, okazis en la belega korea urbo Busan, situanta inter monto kaj maro, kie oni renkontas historiajn rakontojn, bone konservitajn tradiciojn, templojn kun miljara historio. Partoprenis 170 esperantistoj el 21 landoj, kiuj ĝuis la komforton de la junulargastejo ARPINA, moderna konstruaĵo, kiu entenas sub la sama tegmento la gastejon kaj la kongresejon. Tio ebligis komunan kunestadon tage kaj nokte - aparta allogo de la intimaj aranĝoj. La programo estis riĉa, bunta, kaj... kiel kongreso kiu respektas sin, okazis paralelaj programeroj. Krom la tradiciaj frandvespero, nacia kaj internacia vesperoj, ekskursoj, prelegoj, kursoj k.a., aperis en la programo du novaj eroj: *Pedagogia Foiro*, specifa al ILEI kaj necesa, dum kiu oni prezentis instrumaterialojn, kaj *Literatura Kafejo* - prezentado de libroj, same necesa kaj utila, des pli ĉar ĝi parolas pri libroj kaj fervoraj legantoj, kun bonega parolkapablo kaj bela lingvo. Alia novaĵo estis la *Internacia Pedagogia Film-Festivalo*, kadre de la *Jaro de la Lernanto*; ĉiuj premioj iris al Ĉinio kaj indas spekti en *Youtube*, kie ILEI kreos kanalon, la kvar filmetojn.¹

La temo de la kongreso estis *Edukado al respektoplena turismo*. La enkonduka prelego al la kongresa temo difinis kaj klarigis, kio estas turismo, montris la celojn kaj manierojn turismumi, kio estas respekto al la homoj, al kulturaj monumentoj, al la naturo, kiel instrui respekton, aludis pri la franca proverbo: „En Romo agu kiel romloĝanto”, *mutatis mutandis* en Esperantujo agu kiel esperantisto. Kaj jes, Busano estis Esperantujo, kie homoj el kvar

¹ La kanalo estas kreita kun la nomo: Esperanto + Edukado ILEI - *NdlR*

kontinentoj agis kiel esperantistoj: estis tie respekto, amika etoso; koreoj kun japanoj kaj ĉinoj dancis polonezon, eŭropanoj dancis japanan farandolon kaj estis belaj momentoj de kunkantado. [*surfote: kurso por progresantoj*]



La ĉi-jara ILEI-Kongreso havis pli da artaj programeroj: krom la bunta nacia vespero, kiam ni vidis kaj aŭskultis multajn artistojn, belajn kostumojn, specifajn dancojn kaj tradician, sed ankaŭ modernan muzikon, aperis korea muziko en ĉiu programero: dum la frandvespero, dum la malfermo, kaj, io tute nova, dum la lingva festivalo, sur la granda placo de la urbo.

Busan lasas en mia menso kortuŝan memoron: la UN-parko kun la sola tombejo en la mondo dediĉita al la UN-armeo, kie ripozas pli ol 2000 militistoj el 16 landoj, batalintoj sub la gvido de UN por liberigi la Sudan Koreion. Belaj statuoj ŝajnas demandi, kial homoj mortas pro milito, kial homoj startigas militon... La prezidanto de la LKK, en sia bonveniga mesaĝo, konfesas, ke, preparante la kongreson, la lokanoj kreis nur „grundan bazon” kaj instigas nin por ke ni „kune masonu belan konstruaĵon kaj ĝin plenu per...”. Ni plenu per respekto, kunlaborado, amika sinteno, toleremo, interkompreniĝo kaj... paco, por respondi al la belaj statuoj de la UN-parko.

ILEI aktivas dum la UK

TAGO DE LA LERNADO

Estas multjara kutimo, ke la marda tago dum UK estas dediĉita al la lernado, librelegado, lernejoj... kaj estas kutimo, ke ILEI organizas ĝin. Nun ILEI havas komisiiton por fari la preparlaborojn, temas pri Sinjorino Marija Belošević el Kroatio. Ŝi kontaktas la eblajn prelegantojn kaj starigas la programon. Valora kunlaboranto por la Ligo ŝi estas.

En Seulo la programo rilatis al la kongresa temo de la 50-a ILEI-kongreso en Busano: *Edukado al respektoplena turismo*. La programo tamen respektis la kutimon, ke la aŭskultantoj eksciuj pri la instrusistemo de la gastiganta lando. Do ni unue aŭdis prezenton de Sinjoro HONG Sungcho, lernejestro de virina altlernejo. Kvankam evidentiĝas la ligoj inter Koreio kaj Ĉinio en la pasinteco, la lernado de la ĉinaj ideogramoj ĉesis esti deviga studobjekto en la jaro 1970.

Instigan prelegon faris D-ro Probal DASGUPTA starigante diversajn pensigajn demandojn pri turismo kaj interkultura kunvivado. Ĉu ni esperantistoj estas iel iom nekutimaj turistoj?

Turismo kaj religio: pilgrimado. Tion prezentis Leif NORDENSTORM.

Turismo kaj ekologio: jen la temo de D-ro Duncan CHARTERS.

La publiko aŭdis pri diversaj landoj kiel Armenio (prezentita de Karine ARAKELJAN), Rumanio (prezentita de Aurora BUTE), Kroatio (prezentita de Marija BELOŠEVIĆ).

La ĉeestantoj aŭdis plie pri instruado de E-o en Moskvo (Anna STRIGANOVA), pri argumentoj por Esperanto (Rafael ZERBETTO), pri la Esperantlingva versio de UNESKO-kuriero (Huang Yinbao 'Trezoro'), pri la evoluo de la programo *Ekparolu* (D-ino Katalin KOVÁTS), pri turismo kaj franca ekzameno (D-ro François LO JACOMO).

Mallonga sed grava momento estis la kunveno de D-ro Mark FETTES,



prezidanto de UEA, Stefan MACGILL, vic-prezidanto de UEA, kaj Mireille GROSJEAN, prezidanto de ILEI; post la detala raporto de M. Grosjean pri la Jaro de la Lernanto venis la momento fermi tiun agadon. Tion faris la 3 estraranoj (*vidu komunan foton sur p. 16.*)

La leganto povas konstati, kiom varia kaj enhavoriĉa estis tiu Tago dediĉita al lernado.

*Mireille GROSJEAN
Prez de ILEI*

Simpozio - Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj HUFS UK Seulo 2017

Universitata Simpozio en HANKUK Universitato de Fremdaj Studoj HUFS. Kadre de la UK.

Nuna stato kaj evoluo de la instruado de Esperanto kiel internacia lingvo en la tuta mondo.

La Universitato HUFS eniris la organizan fazon proponante tiun titolon kaj ekrilatis kun ILEI, kies ĉefa tasko estas prizorgi la instruadon de Esperanto. Konsekvence la organiza laboro estis tute logike en la manoj de ILEI, ĉefe en la manoj de Sinjoro PARK Yongsung, „Nema”, estro de la korea ILEI-sekcio.

PROGRAMO

- Mireille GROSJEAN: Esperanto instruado-edukado en tutmonda skalo
- Tosihiko YAMASITA (JP): Panorama metodo.
- Gábor MÁRKUS (HU): La lingvo de espero.
- Ronald GLOSSOP (USA): pri la organizaĵo „Infanoj ĉirkaŭ la mondo”.
- Xiaofeng GONG (CN): konciza historio de la Esperanto-movado en Ĉinio.
- Youngkoo LEE kaj Yongsung PARK „Nema” (KR): Koreio kaj Esperanto.
- Ruben FERNANDEZ ASENSIO (ES): Lingvistiko, instrumentoj kaj Esperanto, ne forlasu la plenkreskulojn!
- Dmitrij ŜEVĈENKO (anstataŭigita de Anna Striganova) (RU): Esperanto-edukado kaj ĝiaj perspektivoj en Rusio.
- Maria BUTAN (RO): Instruado kaj lernado de Esperanto en Rumanio.

- Dalia PILECKIENĖ (LT): Esperanto-edukado kaj ĝiaj perspektivoj en Litovio.
- Katalin KOVÁTS (HU/NL): la situacio de instruado de Esperanto en lernejoj iam kaj nun.
- Inchol KIM, prezidanto de HUFES
- Jaewook KIM, Prezidanto de la Fremdlingva instituto de HUFES

La universitato kaj ILEI ricevis ĉiujn prelegojn antaŭe. La universitato printis la prelegaron en dulingva eldono: Esperanto kaj korea lingvo. Tiel la gestudentoj en la salono povis sekvi la prelegojn legante la korean tekston. Por debatoj kaj konkludoj estis posta interpretado.

La kontaktoj kun la universitato, ĝia prezidanto kaj la prezidanto de la fremdlingva instituto estis tre fruktodonaj kaj agrablaj danke al la efika perado de Sinjoro LEE Youngkoo, prezidanto de Korea Esperanto-Asocio. Ni povas esperi, ke naskiĝos novaj komunaj projektoj. Rimarkindas, ke la Universitato HUFES havas multajn kunlaborojn tra la mondo kun diversaj establoj, inter aliaj la Libera Universitato de Bruselo (BE), kie instruas esperantistino, D-ino Kristin TYTGAT. Ni esperu je pozitivaj sekvoj de tiu brila evento kaj ni laboru al tio.

Esperanto instruado-edukado en tutmonda skalo

Kontribuo de Mireille GROSJEAN, prezidanto de ILEI

Ni parolu pri instruado-lernado de Esperanto. Laŭ mia titolo ni konsideru tion en du intereso-aksoj.

Unue: ni devas pensi mondscale. Tio fakte ne estas facila agado. Ĉiu el ni restas ligita al la kutimaj limoj kaj kadroj. Ni konas la mondon tra la informoj de niaj enlandaj amaskomunikiloj. Tiuj kadroj donas ian fidon; forigi la kadrojn timigas. Konsideri la tutan mondon povas esti ne facile, depende de la lokoj, eĉ tute ne eble pro manko je informoj pri la cetera mondo. *Pensi mondscale kaj agi loke*, pri tio ni devas nin ekzerci laŭ la slogano de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT): „Ni al kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!”

Eĉ se ni ne kapablas forigi la politikajn limojn, ni devas klopodi pensi translime. Pro mia posteno de prezidanto mi ĉiutage laboras mondscale; Interreto ebligas tion; mi observas, ke tio estas por mi kutima, kaj plie giganta ŝanco kaj ke multaj homoj ne kutimas fari tion. Kadre de la agadoj de la Ligo ILEI, preparante la enhavon de nia organo *Internacia Pedagogia Revuo*, de

nia revuo *Juna Amiko*, mi daŭre havas la mondon antaŭ miaj okuloj kaj provas zorgi, ke ĝi aperu en la enhavo de niaj revuoj. Tia labormaniero similas al sporto, gimnastiko por la menso.

Kiel fartas la instruado de Esperanto en la tuta mondo? Mi ne povas respondi per unu sola vorto.

Mi listigu pozitivajn faktojn:

Tutkomence ni restu en Azio: **Grava agnosko de Esperanto**

La instanco UNWTO substrekis la valoron de Esperanto en sia deklaro de Manilo, ĉefurbo de Filipinoj, de la jaro 1980:

„The World Tourism Organisation Underlines in this respect the importance of knowledge of languages notably those with a universal vocation such as esperanto.


La Monda Organizaĵo pri Turismo substrekas ĉi-rilate la gravecon havi konojn en lingvoj, ĉefe en lingvoj kun universala aspiro kiel estas Esperanto.”



Lingvistoj nuntempe strebas al priskribo de funkciaj komunikiloj kaj ne nepre interesiĝas nur pri ĝustaj frazoj. Pro tio multaj el ili aliras al Esperanto sen antaŭjuĝoj kaj konstatas la taŭgecon de nia lingvo en internaciaj rilatoj. Tio estas ĝenerala tendenco, tio ne ekzistas en ĉiuj anguloj de la Tero.

Plia pozitiva fakto: amaso da personoj lernas Esperanton, speciale per la metodo Duolingo, uzebla per poŝtelefonoj. Surbaze de la angla lingvo eklernis proksimume 800 000 personoj tutmonde ekde majo 2015. Surbaze de la hispana lingvo proksimume 200 000 ekde aŭgusto 2016. Entute pli ol miliono da homoj montris intereson kaj klakis sur la verdan flagon en la ĉefa paĝo de la retejo Duolingo. Dekono de ili finas la kurson. Pluraj el ili iras al lokaj kluboj, diversaj renkontiĝoj, uzas la paroligan programon „Ekparolu” de la retejo edukado.net. Aliaj retaj kursoj uzatas en diversaj landoj kaj kontinentoj.

Plia pozitiva fakto: post agnosko de Esperanto ĉe la Eŭropa Lingva Referenckadro de Konsilio de Eŭropo en 2006 la KER-ekzamenoj nun bone evoluas kaj pli ol mil personoj akiris tiun ŝtate agnoskitan diplomon. Tiu nova sistemo iom faras ombron al la ekzamensistemo de ILEI-UEA, sed tio ne gravas. Estas evidente, ke esperantistoj preferas provi ŝtate agnoskitan ekzamenon ol movadan ekzamenon. (*Vidu foton sur p. 20*)



Plia pozitiva fakto: UNESKO metis nian majstron Zamenhof en la liston de honorigendaj personoj por la jaro 2017, cent jarojn post lia morto en 1917.

Pliaj pozitivaj faktoj: Esperanto-vikipedio atingas 240 000 artikolojn. Esperanto estas nemateria kultura heredaĵo de Pollando. *Google-translate* metis Esperanton en sian liston. La muzeo kaj arkivejo en la universitato de Zaozhuang, Ĉinio, akiras famecon en la Esperanto-movado.

Agadas homoj en diversaj mondopartoj, kunvenas lokaj kluboj, okazas Esperanto-kursoj. Aperis en 2017 „Amikumu”, apo; kiu ebligas

rapide trovi la plej proksiman Esperantoparolanton. Tio stimulas renkontiĝojn evidente.

Plia pozitiva fakto: la franca edukministro eldonis anoncon, kiu donas permeson al la lernejestroj organizi kurson pri Esperanto en siaj establoj.

En tiu ĉi momento mi ŝatus iri al kerna punkto: ĉu forta apero de Esperanto en orienta Azio puŝos nian lingvon tra la tuta mondo, aŭ ĉu forta apero de Esperanto en Francio kaj Eŭropo pli efikus? Oni aŭdas diversajn opiniojn pri tiu demando. Eŭropo nomiĝas la „malnova kontinento”, ĉu ĝi povos doni decidigan elanon al nia lingvo? Orienta Azio kaj ĉefe Ĉinio enorme gravas en la nuna mondo, politike kaj ekonomie. Ĉu tie estas la forta motoro por nia lingvo? La ĉina ILEI-sekcio estas la plej granda ĉe ILEI. La origino estas probable simple la dimensio de la lando. Motoroj estas ankaŭ la individuoj en nia Movado. En la Ligo estas ĉina vic-prezidanto sinjorino Profesoro Gong Xiaofeng. Ĉe UEA estas estrarano Lee Jungkee el Koreio. En Ĉinio estas sinjoro Huang Yinbao, nomata „Trezoro”, kiu interalie zorgas pri la tradukado de la Unesko-kuriero al nia lingvo. En Japanio agadas Hori Yasuo, kiu lanĉis la Esperanto-Sumoon, interesan programon por kontribui per legado al lertigado de esperantistoj. Kaj multaj aliaj forte kaj efike

kontribuas al la disvastigo kaj instruado de nia lingvo. Mi ne povas citi ĉiujn nomojn. En mia prezidanta laboro mi plurfoje tage rilatas per retmesaĝoj al orienta Azio; tiu regiono estas forta motoro de nia movado. Al la kerna demando: ĉu Eŭropo aŭ orienta Azio, aŭ eble Brazilo, faros la decidigan puŝon por Esperanto en la venontaj jaroj, mi ne povas respondi. Mi nur certas, ke ĉiuj el ni laboras en nia loko por la bono de nia celo.

Mi ankaŭ kapablas nun listigi negativajn aspektojn de la nuna situacio de la instruado de Esperanto. La Ligo ILEI ne havas eĉ mil membrojn, malpli ol IFEF, la fervojistoj. Kion ni plej multe bezonas: instruistojn aŭ fervojistojn? ILEI devus lertigi kaj diplomi centojn da novaj instruistoj jare. Okazoj por diplomiĝi ekzistas en Poznano, Pollando, kaj kurso okazadas kadre de niaj kongresoj. Apud tiuj oficialaj atestoj multaj entuziasmaj esperantistoj ekinstruas junaĝe aŭ emerite sen ia lertigado. Tio montras, ke ni daŭre estas en pionira fazo. Baldaŭ uzeblis perreta senpaga lertigado pri pedagogio en reta platformo de la germana Landa Asocio; multaj homoj atendas tiun eblon lertiĝi studante hejme kaj progresante per la Reto en interŝanĝo kun foraj spertuloj.

Inter la negativaj aspektoj mi devas mencii la malmultajn lernantojn de Duolingvo, kiuj aperas en la movado. El tiu miliono povus esti multe pli da kongresanoj kaj membroj de niaj ekzistantaj asocioj. Ni povas nur supozi, ke ili legas Esperantajn verkojn, vojaĝadas tra la mondo, uzas Pasportan Servon, nian *esperanto-couch-surfing*. Mi supozas, ke la asocia vivo kun jarraportoj, bilancoj kaj buĝetoj ne entuziasmigas vojaĝemajn junulojn.

Negativa estas certe ankaŭ la manko de intereso de la amas-komunikiloj pri nia lingvo. Pri kio raportas la gazetoj: ĉefe pri famuloj, seks-aventuristoj, rekordaj sportistoj, skandaluloj, ŝtelistoj kaj murdistoj; esperantistoj kutimas esti kvietaj kaj respektplenaj homoj, do ne interesaj por la gazetoj. Iu persono, kiu honeste faras sian laboron, ne estas novaĵo.

Alia negativa aspekto estas la relative malforta intereso de la eduk-instancoj. Tie regas intereso pri lingvoj, kiuj alportas profesiajn plusojn por la junularo, kaj tie regas „cocacolanizado”, koloniado pere de la angla lingvo. Malgraŭ la raporto de Profesoro François GRIN el la universitato de Ĝenevo, Svislando, kiu pruvis la ekonomian valoron de la instruado de Esperanto – pli alta atingo per malpli alta elspezo – la edukministroj fidelas al la brit-usona hegemonio.

La dua akso de mia prezento estas la vorto-paro INSTRUADO – EDUKADO. Se en la instruprogramo de iu lando aperas iu lernenda lingvo, tio estas ilo al lingvokapabloj kaj aliro al la kulturo de tiu lingvo. Tute same pri Esperanto. Eĉ pli. Laŭ mia konstato, sento kaj konvinko por la lernado de

la internacia lingvo Esperanto havas edukan valoron. La studentoj sendepende de sia aĝo malkovras la trezorojn de la literaturo de multaj landoj, ekrilatas kun homoj el plej malsamaj kulturoj kaj eniras senton de aparteno al tutmonda familio. Neniu alia lingvolernado ofertas tion. Solidareco, toleremo, komprenemo, tiuj valoroj estas transdonataj okaze de instruado de Esperanto, okaze de legado de nia abunda literaturo, ĉu originala, ĉu tradukita. Niaj renkontiĝoj kaj kongresoj ebligas rektan kontakton, konatiĝon, amikiĝon. Nia kunlaboro en niaj tutmondaj agadoj kiel ILEI, kiel la semajno de amikeco en februaro, kiel kadre de niaj fakaj asocioj edukas nin al frataj rilatoj respektplenaj. Tio estas la plej valora flanko de la uzo de Esperanto. Oni ofte aŭdas: Esperanto, lingvo de paco. Estus bele, se tio estas vero. Tamen ni ne estas anĝeloj, ni estas simplaj homoj. Do evidente ankaŭ konfliktoj aperas foje inter ni. Sed la uzo de nia lingvo ebligas la bezonatajn klarigojn por solvi la konfliktojn. Do ek al instruado de la lingvo Esperanto kaj al uzo de ĝi!

PRI LA ORGANIZAĴO „INFANOJ ĈIRKAŬ LA MONDO”

de Ronald GLOSSOP, <rglossop@mindspring.com>, Direktoro, IĈLM.

27 julio 2017, prelego dum la simpozio „Nuna stato kaj evoluo de la Instruado de E-o kiel internacia lingvo en la tuta mondo” organizita de HUFUS (HANKUK-Universitato pri Fremdaj Studoj) kaj ILEI en Seulo



La organizaĵo „Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo” estas fondita de Charlotte KOHRS kaj kelkaj amikinoj en San-Diego, Kalifornio, en Majo 1987. Charlotte ne nur instruis Esperanton al infanoj en San-Diego, sed ŝi ankaŭ produktis kelkajn videobendojn, elsendis duonjarajn bultenojn por infanoj, komponis kantojn por instrui Esperanton al infanoj, kaj verkis libretojn, kiuj povas servi kiel lernolibroj por infanoj. La libretoj, kiujn ŝi verkis, inkluzivas *ABC EN ESPERANTO*, *LA BELA PLANEDO*, *DEK DEMANDOJ*, *NI PAROLU ESPERANTE KUNE*, *NI ESPLORU LA MONDON*, *DEK FABELOJ* kaj *FLUGU KUN PETRO*. Ŝi ankaŭ komponis dek du konversaciajn kantojn por lernantoj. Ili estis eldonataj en la libreto *KANTU ESPERANTE*, kaj tiuj kantoj ankaŭ estis eldonitaj kiel son-kasedo

KANTU ESPERANTE KUN JANICO KAJ JOHANO. Dum siaj lastaj jaroj Charlotte ricevis multe da helpo pri bildoj kaj aliaj aferoj de Jim FAGHNAN. Pro sia granda laboro por Esperanto, Charlotte estis nomumita „Honora Membro” de la Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko en 1999.

Tiun saman jaron Charlotte decidis pro sanproblemo, ke ŝi ne plu povus esti la Direktoro de „*Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*.” Darlene EVANS en la ŝtato Iovao faris tion dum du jaroj, sed tiam ankaŭ ŝi devis rezigni pro sanproblemo. En la jaro 2001 la emerita profesoro Ronald GLOSSOP en Sankta-Luiso iĝis la Direktoro. Charlotte mortis en la jaro 2002. Ron diris: „Mi opinias, ke mia ĉefa tasko estas informi ĉiujn pri la bonaj materialoj, kiujn Charlotte kreis, kaj daŭrigi la projektojn, kiujn ŝi komencis. Nun oni devas uzi la retejon por fari tion, sed oni ankoraŭ devas uzi ordinaran poŝton por tiuj instruistoj, kiuj ne povas uzi komputilon.”

Vilĉjo Mania en Chikago kreis la retejon <www.icxlm.org>. Li ricevis de Charlotte la rajton meti ĉiujn ŝiajn verkojn en ĝin. En la jaro 2005 Vilĉjo sciigis, ke li ne plu povas fari tion. Feliĉe Enrique ELLEMBERG konsentis mastrumi kaj plibonigi nian retejon. Li tre plibonigis la retejon, por ke ĉio estu ne nur en Esperanto kaj la angla lingvo, sed ankaŭ en la hispana lingvo. Li aldonis aliajn edukajn materialojn kaj videojn kiel „*Mazi en Gondolando*” kaj ligojn al aliaj utilaj retejoj. Dankon al la grava helpo de Enrique Ellemborg, ĉiuj verkoj de Charlotte nun restas haveblaj en la retejo <www.icxlm.org>. Enrique verkis mallongan artikolon pri la retejo de IĈLM, kiu aperis en la INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO, 2008/1, paĝoj 30-31. Oni ankaŭ povas trovi la diversajn verkojn de Charlotte en la retejo <www.edukado.net>.

La ideo de Charlotte, ke oni devus instrui Esperanton al infanoj, certe ne estis nova. Efektive en decembro 1920, dum la unua kunveno de la Asembleo de la Ligo de Nacioj, Lord Robert CECIL, la delegito de Sud-Afriko al la Ligo de Nacioj, proponis rezolucion, ke ĉiuj landoj devus aranĝi la instruadon de Esperanto al ĉiuj infanoj en la tuta mondo, por ke en la estonteco ĉiuj homoj en la mondo per ĝi povu komuniki kun ĉiuj aliuloj. [Peter G. Forster, *THE ESPERANTO MOVEMENT* (The Hague: Mouton, 1982, p. 172.)] Bedaŭrinde, tiu rezolucio ne estis adoptita pro la opozicio de la registaro de Francio. Unu argumento, kiun la francoj uzis, estis ke jam ekzistas monda lingvo, la franca, do infanoj devus lerni ĝin anstataŭ Esperanton. Bedaŭrinde, kelkaj angleparolantoj kaj iliaj registaroj nun volus uzi similan argumenton pri la angla lingvo. Tiuj ne konsideras la fakton, ke infanoj povas multe pli rapide kaj facile lerni la lingvon Esperanto, speciale kreitan por tiu celo.

Ekzistas unu parto de la mondo, kie multaj infanoj kaj gejunuloj nun lernas Esperanton, sed bedaŭrinde ne povas uzi komputilojn por fari tion. Mi parolas pri la sub-sahara parto de Afriko – Benino, Burundo, Ruando, Ugando, Kenjo, Togolando, Malavio, Demokrata Respubliko Kongo. En tiaj landoj estas multaj orfoj pro militoj, aidoso, malario kaj aliaj malsanoj. Kelkaj esperantistoj kreis lernejojn por tiuj orfoj. Ili volas instrui Esperanton al la orfoj, ĉar ĝi estas lingvo, kie la parola formo kaj la skribita formo de la lingvo tute kongruas, kaj kie la lingvo mem estas tute logika lingvo. Alia grava faktoro estas, ke tiuj infanoj en Afriko uzas diversajn afrikajn lingvojn. Ankaŭ por ili eĉ ekzistas diversaj eŭropaj lingvoj uzataj tie kiel la angla, la franca kaj la portugala. Tial Esperanto estas tre utila lingvo por tiuj infanoj kaj gejunuloj.

Kion tiuj geinstruistoj bezonas? En tiu parto de la mondo, la gelernantoj ne povos uzi komputilojn. Ili bezonas librojn, skribilojn, paperon, seĝojn, monon, kaj eĉ dentobrosojn. La organizo „*Infanoj ĉirkaŭ la mondo*” provizas per tiuj kaj eĉ kelkaj aliaj aferoj kiel pilkoj kaj uniformoj por futbala teamo. Plejparte oni uzas la libretojn, kiujn Charlotte verkis. Alia tre utila libreto por ili estas *POŜAMIKO*, verkita de Beatrice ALLÉE kaj Katalin KOVÁTS.

Tamen estas unu nova aĵo, kiun Ron GLOSSOP kiel Direktoro kreis. Kiam li havis ŝancon instrui Esperanton al infanoj en Ĉinio, li eltrovis, ke bona ilo por helpi fari tion estas uzi simplan popularan kanton kiel „*Ruĝa Pomo*”. La infanoj povas kanti ĝin kune denove kaj denove. Poste ili povas dialogi pri la kanto. Ekzemple, „Pri kio estas la dua strofo?” kaj „Laŭ la kanto kiukolora estas tablo?” En ŝia libreto *KANTU ESPERANTE*, Charlotte havis nur tri strofojn de tiu kanto, nome, la tri strofojn jam verkitajn de la norvega Jan ROMMESMO pri ruĝa pomo, nigra kato kaj blua tablo. Kial nur tri strofoj pri nur tri koloroj? Ron decidis verki novajn strofojn pri aliaj koloroj, kaj li ekuzis la novan titolon „*Kanto de la Koloroj*.” Li eldonis novan lamenigitan libreton kun dek tri strofoj kaj belaj bildoj, desegnitaj de Mar CARDENAS. Ĝi videblas en la retejo. Nun IĈLM ankaŭ vendas instrumaterialojn, kaj oni sendas ilin senpage al instruantoj de Esperanto tra la tuta mondo, aparte al pli malriĉaj landoj, kiuj ne povas aĉeti ilin aŭ facile akiri la informon de nia retejo.

La „*Kanto de la Koloroj*” havas dek tri strofojn, sed ili estas en logika ordo por helpi memori ĝian ordon. La unuaj kvar strofoj estas pri la kvar ĉefaj koloroj en ĉielarka ordo: **ruĝa** pomo (frukto), **flava** rozo (floro), **verda** cedro (arbo) kaj **blua** jupo (vesto). La postaj kvar strofoj estas por la neŭtralaj koloroj: **nigra** kato (besto), **blanka** mevo (birdo), **bruna** tablo (meblo) kaj

griza salmo (fiŝo). Poste estas du popularaj koloroj: **oranĝa** pilko (ludilo) kaj **purpura** aŭto (veturilo). La dek-unua kaj dek-dua strofoj estas por la metalaj koloroj: **arĝenta** forko (manĝilo) kaj **ora** ringo (ornamo). La lasta strofo ne estas pri alia koloro. Ĝi estas la grava infana himno por esperantistoj verkita de Charlotte KOHRS mem: „*Sur la Tero, bela Tero, Loĝas ni, kantas ni, Kune sur la Tero, Monda familio, famili', famili'.*”

Kontribuojn por helpi IĈLM fari sian laboron oni povas doni al la „*Fonduso por Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*” ĉe *Esperanto-USA, 1500 Park Avenue, #134, Emeryville CA 94608*. Dankon pro via helpo.

Lerni pri la historio, en kiu hejmas niaj vizitatoj

de Probal DASGUPTA (Barato)

Prezento farita en Seulo okaze de la UK 2017 kadre de la Tago de la Lernado, en rilato kun la temo „Edukado al respektplena turismo”.



Prezento: Kiam ni turismas, ni vizitas ne nur hotelon, aŭ ne nur gastigantan personon / familion, sed la tutan komunumon loĝantan en la urbo, en kiu ni zumas. La vidindaĵojn ni certe ne preteratentu; sed ni vizitas homojn enplektitajn en historio, kiun ili disvolvas pluen. Kion signifas la ideo, konatiĝi kun ili ene de tiu historia hejmo? Ĉu simple legi, dum ni pretiĝas por la vizito, bazan skizon de la politikaj eventoj, kiuj muldis la nunajn landlimojn?

Nur por demandi nin

- Mia celo estas pensigi, ja ne trudi opiniojn. Tial mi prezentos hodiaŭ ĉefe demandojn. La respondoj devos esti viaj. Temas pri *viaj* vivoj, *via* turismado, kion *vi* volas fari pri tiu grava parto de via persona tempo.
- Ĉu la turismado estas iaspeca malo de serioza laboro? Multaj uzas la vortojn ‘turistoj’ kaj ‘turismi’ kiel insultilojn. Instruistoj foje diras al siaj kursanoj “Vi ne venis por serioze kursi. Vi nur turistas. Kial do vi entute aliĝis al la kurso?” Ĉu *vi* konsentas kun tiu sinteno?

Kiun do vi vizitas?

- Kiam vi turismas, vi vizitas ne nur hotelon, ĉu? Eble iun gastigantan personon / familion? Tamen, vi zumas tra la loko, ĉu ne, fotante la vidindaĵojn – tio ja signifas, ke la lokon vi vizitas. Kion do la loko atendu de vi? Atenton, fotadon, jes ja. Sed ĉu pli ol tion?
- Mi ne manovras, mi ne manipulas viajn sentojn. Mi vere starigas al vi demandon, kaj petas ĉiun el vi *mem* decidi, precize kian atenton vi, individue, volas dediĉi al la loko vizitata de vi. Eble post la pripensado iuj inter vi konkludos, ke vi vizitas homojn, kaj ke jen la atuto de la esperantista turismo. Aliaj konkludos alie.

Supozu, ke homoj vizitas homojn; sed kie?

- La vidindaĵojn vi certe ne preteratentos, ankaŭ se turismas homoj ĉe homoj; oni vizitas do homojn enplektitajn en geografio markanta la historion. Ni iom haltu tie. Kio por vi estas la historio?
- Ofte la vorto ‘historio’ signifas nur la pasintecon. Viaj referenciloj certe sendas vin al diversaj malnovaj momentoj, kiam etno A, ekzemple, venkis etnon B, konkeris landon B, longe okupis ĝin. Tial paroliĝas ankaŭ lingvo A en lando B. Imperioj. Kolonioj. Cikatroj, kiuj ne foriris, kiuj ankoraŭ hodiaŭ venenas la rilatojn inter etno A kaj etno B. – Studu ĉion tion!

Kion, tamen pri la estonteco estiĝanta?

- Vizitanto volanta kleriĝi pri la vizitota lando certe pretigos sin per tia studado de ĝia pasinteco. Tamen, ĉu nur tion signifu la ideo, ke homoj renkontas homojn en ties historia hejmo? Homoj ankaŭ *faras, kreas, forĝas* sian veran historion, ĉu ne?
- Kio por vi estas la historia estiĝo de estonteco? Eble vi vizitos landon, kiu drame fasonas al si novan historion, ekz Tunizion tuj post revolucio, aŭ Nepalon post adopto de konstitucio. Tie la lokanoj devigos eĉ aliajn turistojn atenti la dramon. Ĉu *vin, esperantiston*, iu bezonas *devigi*? Ĉu vi ne mem *volas*?

Konkretigi la demandon: Darĝilingo

- Ĉu vi aŭdis pri Edmund Hillary kaj pri Tenzing Norgay?
- Mi, dekjara, vizitis en 1963 la turismajn vidindaĵojn en la urbo Darĝilingo en la norda parto de mia gubernio, Okcidenta Bengallando. Permesu, ke mi rapide klarigu pri Bangladeŝo...
- Tie mi vizitis la instituton pri montogrimpado. Staris tie Tenzing Norgay. Mi manpremis kun tiu fama grimpisto. Gravas 1953!

- 40 jarojn poste, mia filo, 13-jara, vizitis kun siaj gepatroj la saman Darĝilingon; Tenzing Norgay jam ne vivis. Everesto, aŭ Ĉomolungma, ne plu estis reliefa aktualaĵo. Kion li vidis? Kion ne?

Eduko por malsamterenanoj; memstareco

- Kiel vi rilatas al movadoj por memstareco? Kiamaniere tio rilatas al la eduko konforma al lokaj bezonoj kaj ankrita en la gepatra lingvo? Ĉu nur memstara gubernio aŭ regno povas atingi socian memstarecon?
- Certe la ĉiĉeronoj, ankaŭ tiuj kiuj parolas Esperanton kun vi, havas proprajn vidpunktojn pri ĉio ĉi. Foje ili diverĝas inter si. Mi foje aŭdis kverelon inter francoj kaj germanoj pri la **unua** mondmilito! Kiel vi reagus?

Se vi volas pacon, atentu malkonsentojn:

- Eble vi nur rimarkis, ke la saman monton iuj nomas Everesto, aliaj Chomolungma. Eĉ tiu punkto gravas. Se vi forprenis nur tion el la prelego, tio jam sufiĉas. Bonvolu ne ĉesi pensi pri la demandoj!
- GRANDAN DANKON!

Freinet-pedagogio – Parto I

La teorio de la praktiko

Aŭ: kial preferindus malpli da teorio

de Mónica MOLNÁR (Svislando/Hungario)

Pedagogio, edukado, lernejo, lernejoj kun siaj avantaĝoj kaj/aŭ la maloj... Jen temoj, kiuj estis, estas kaj restos ĉiam aktualaj en la homa socio. Foj-foje ni aŭdas pri ĝojigaj eventoj, rezultoj koncerne la lernejan sistemon, instruadon, sed sincere dirite estas multe pli da kritikoj, kiuj saltas al niaj okuloj legante ĵurnalojn, rigardante televidajn, interretajn raportojn.

La temo estas tre serioza, ja temas pri la preparo de la futura generacio, kiu baldaŭ prenos nian lokon. Kiajn posteulojn ni ŝatus havi post ni? Ĉu sen-pripensajn obeemulojn? Ĉu furiozajn ĉion-kontraŭulojn? Ĉu programitajn robotojn? Ĉu malordajn revulojn? Ĉu senentuziasmulojn, kiuj eĉ se komencos ion, eble neniam finos ĝin? Aŭ ĉu konsciencajn, toleremajn kunlaborantojn, kiuj respektas la aliajn kaj sian ĉirkaŭaĵon?

La temo estas serioza, multfaceta kaj kompleksa, ĉar multaj diversaj faktoroj devas esti konsiderataj kaj bone elektitaj por ke la “maŝino” enorde kaj sencohave funkcii.

La temo estas serioza, tamen per du ŝercoj mi ŝatus altiri la atenton al du neneglektendaj danĝeroj (inter multaj aliaj) de la lerneja laboro. Verŝajne la ilustraĵoj kaj la humuraĵoj estas konataj de multaj homoj, tamen valoras reripensi ilin:

Unu grava problemo estas la amaso da lernendaĵoj. Ĉiujare estas pli kaj pli da materialo, kiun la gelernantoj devus enkapigi kaj redoni, reprodukti



dum kontroloj, ekzamenoj. Ĉiuj fakuloj konsideras sian fakon tre grava (se ne la plej grava), do neniu volas redukti la kvanton de sia lernenda materialo, ĉiuj preferas nur aldonadi la novaĵojn, kiuj tute nature aldoniĝas de jardekoj al jardekoj je ĉiu kampo. Tamen, ĉu iu pensas foje pri la kompatindaj geler-

nantoj? Iliaj infanaj kapetoj ne grandiĝas kun la kreskanta lernenda materialo!

Alia, same neneglektenda aspekto estas, ke oni volas de ĉiuj individuoj la samon je la sama nivelo. La dua bildo resumas la edukan sistemon de multaj landoj, lokoj.


Kvankam ankaŭ Einstein klare kaj simple deklaris: „Ĉiuj estas geniuloj. Sed se vi volas pritaksi fiŝon laŭ ĝiaj arbo-grimpaj kapabloj, ĝi pasigos sian tutan vivon kredante sin stultulo, senkapablulo.”

Ĉu vere tio estas justeco? Espereble ne!

Ĉu vere ĉiuj estas geniuloj? Jes, absolute jes! Ĉiuj estas genie kompetentaj je iu tereno. La tasko de la lernejo devus esti akompani la infanojn al la malkovro de siaj geniecoj, trovi en kio ili havas la plej bonajn kompetentecojn. Estos tiuj, kiuj estos la plej bonaj arbogrimpantoj, sed ne ĉiuj. Ĉu tio signifas, ke la aliaj ne estas geniuloj? Ne! Tio signifas simple nur tion, ke ili estas geniuloj je alia tereno kaj ni helpu ilin trovi ĝin.



La sekva demando estas: se la situacio estas tia, kia prezentita sur la desegno (kaj tro multloke bedaŭrinde ĝi ja estas tia), kion oni povus fari por ŝanĝi la lerno-procedon, por plibonigi la kondiĉojn de la gelernantoj, por atingi, ke la scio-akiro estu vola, volonta kaj ne deviga afero, ke la lernitaĵoj havu sencon kaj servu efektive tiujn, kiuj perlaboris ilin. Ĉu oni devus aldoni plusajn horojn por ke ĉiuj „lernu pli efike lerni”? Tio povus ŝajni bona ideo, sed... Atenton! Tio estus tuj falo en ambaŭ kaptilojn samtempe pro „plusaj horoj” kaj pro „ĉiuj”. Kiel eviti ilin? Kion oni povas elpensi por la problemo sen pligravigi la situacion? Ĉu oni vere devas ĉiam elpensi ion novan aŭ simple preni iun ekzemplon, kiu funkcias (jes ja, ili ekzistas!) kaj unue analizi, kompari, kompreni la kialojn, due vidi kiel ili aplikblas surloke. Tre gravas ankaŭ tiu dua aspekto, ja kiel ne estas du samaj infanoj, tiel ne estas du samaj lernejoj, nek du samaj instruistoj, nek du samaj kondiĉoj ktp. Dum la homa historio ekzistis pluraj ekzemplodonaj, sekvindaj pedagogoj, kiuj alportis ion al la civilizacio, sed pri kiuj oni pli-malpli forgesis en la granda serĉado de novaj nocioj, novaj metodoj. Unu el ili estis Célestin FREINET [‘selestn frene’].



Célestin FREINET estis franca pedagogo, kiu vivis inter 1896-1966. Li kreis sian pedagogion ne ĉar ne ekzistis alia, sed ĉar li troviĝis en specialaj kondiĉoj. Li eĉ ne tute finis siajn instruistajn studojn, kiam li (kiel ĉiuj aliaj viroj tiutempe) devis iri militservi en la unuan mondmiliton. Tie li sufiĉe frue militvundiĝis kaj devis ĉesigi la soldatecon. Li havis problemojn pri la pulmoj, do ne kapablis paroli longe. Tuj klaris, ke malgraŭ lia profesia formado, la tradicia instruista laboro tute simple fizike ne eblis por li. Pro

la fakto, ke ĉiuj laborkapablaj instruistoj estis en la batalkampoj, li tamen alteriĝis en iu vilaĝeta lernejo. Eĉ se li ne vere kapablis instrui tradicie, oni diris al li: faru kion vi povas. Do, li estis libera kaj li uzis tiun liberecon unue por simple observi la infanojn.

Observante ilin, li vidis, ke en la klasĉambro preskaŭ ĉiuj estis pasivaj, havis sufiĉe tristan mienon. Tute male dum la paŭzo! En la korto la infanoj aktiviĝis, la mienoj lumiĝis kaj ĉiuj bone amuziĝis. Tamen, bona observanto vidis tie pli ol simplan amuziĝon, ĉar la infanoj iu-maniere konstante laboris. Ili konstruis ponton, fortikaĵojn, ili observis ion. Ili ludis rolludon, ili organiziĝis inter si, distribuis diversajn „metiojn” sen nepre nomi ilin tiel. La infanoj nature kaj tre volonte laboris. Freinet volis atingi, ke tiu entuziasma, libervola ardo por la laboro eniru ankaŭ la klasĉambron. Li volis tute simple redoni la plezuron de la laboro, doni sencon al la scioj per konkretaj aktivajtoj. Li volis permesi al la infanoj ankaŭ tion, ke ĉiu povu antaŭeniri laŭ sia propra ritmo, ĉar tute nature estas iuj, kiuj lernas pli rapide, kaj tiuj, kiuj malpli rapide, sed finfine ĉiuj progresas. Li volis, ke ili povu eluzi situaciojn, ke ili povu lerni el veraj, realaj, vivproksimaj problemoj kaj ke ili ne estu nur pasivaj figuroj en la kadroj de dividitaj lernmaterialoj, kie estas 45 minutoj da matematiko, 45 minutoj da historio ktp. Li volis eviti la alvenon al situacio, kie ekster la lecionoj preskaŭ neniu okupiĝas pri la tie lernitaj scioj. Freinet diris, ke tio ne estas vivproksima, la vivo ne estas ja tia. La scioj ne estas disigeblaj, ili kunplektiĝante prezentas nian vivon kaj oni devas elturniĝi en tiu vera vivo. Jen al kio la lernejo devus prepari la ontajn civitanojn. Li volis, ke la gelnantoj estu aktivaj aktoroj de siaj lernadoj. Li volis ankaŭ tion, ke la gelnantoj lernu klare esprimi sin kaj kapablu ankaŭ aŭskulti la aliajn, ke ili kapablu partopreni debatojn jam eĉ junaĝe. Li volis evoluigi la aŭtonomion kaj la respondecon de la infanoj, do li elpensis

materialon, kiun li mem produktis, kie la gelernantoj havas ne nur la taskojn, sed ankaŭ la solvojn. Kelkaj povus tuj pensi, ke tio ne utilas, ja la gelernantoj rigardos la solvojn kaj la tasko estas jam farita. Fakte antaŭe bezonatas iu prepara edukado por ke la infanoj komprenu, ke jes, ili povas kopii la solvojn, sed per tio ili lernas nenion, kaj Freinet atingis tion. Komprenoble li ne mem inventis ĉiujn erojn de sia pedagogio, li uzis ankaŭ metodojn kaj alirojn de aliaj pedagogoj, kiuj agis antaŭ li, kiuj havis, subtenis la samajn valorojn, pri kiuj ankaŭ li pensis, ke ili bonas por la infanoj. Jam Konfuceo deklaris tiujn bazojn, kiujn Freinet efektive uzis en la praktiko dirante sian faman frazon: “Mi aŭdas kaj mi forgesas. - Mi vidas kaj mi rememoras. - Mi faras kaj mi komprenas”.

Tamen, kiel li ligiĝas al Esperanto? Ĉu li ligiĝas al Esperanto? Multaj nunaj praktikantoj de lia pedagogio forgesas aŭ eĉ ne scias pri tio, tamen jes, li uzis Esperanton en sia klaso. Li ekvidis en Esperanto plurajn eblojn kaj jam en tiu epoko korespondigis siajn gelernantojn kun aliaj infanoj kaj per tio li malkovrigis al ili la mondon. Inter la ĉefaj celoj de Freinet estis ankaŭ la transdono de toleremo, respekto, demokratio, kunlaboro. Li volis, ke la infanoj rimarku, kiumaniere kun alilandaj aŭ aliregionaj infanoj ili estas samtempe similaj kaj tamen tute diversaj. Lia pedagogio estas orminejo por tiuj, kiuj kapablas kompreni kaj apliki ĝin.

BEZONATAS KREA ADAPTIĜEMO

Letero de Luiza CAROL el Israelo

En Israelo mankas kursoj pri Esperanto, ĉar mankas intereso por tiaj kursoj. Malgraŭ tio, mi ne estas pesimisma; mi simple konstatas, ke la junularo preferas senpagan memlernadon pere de komputilo aŭ poŝtelefono. La gejunuloj lernas kiam ili havas tempon aŭ emon (ekzemple en trajnoj, en bushaltejoj ktp), ĉiu laŭ sia propra ritmo, la gejunuloj interbabiladas pere de retpaĝoj, retforumoj ktp, kaj ne plu sentas la bezonon viziti movadajn klubojn. Ili diras, ke lokajn prelegojn kaj filmojn oni povas spekti en la denaska lingvo; fremdajn prelegojn, filmojn, koncertojn ktp oni povas spekti senpage per komputilo en Esperanto aŭ aliaj lingvoj; esperantistajn geamikojn oni povas trovi per poŝtelefono sen la helpo de Pasporta Servo... Tion ili diras, kaj ŝajnas ke ni devus adapti nin al la nunaj cirkonstancoj.

Mi mem lernis Esperanton pere de „*lernu.net*” antaŭ 12 jaroj, do mi ne lernis en tradicia klaso, ĉar memlernado per komputilo ŝajnis al mi pli konvena.

La eta Norda Grupo de esperantistoj, al kiu mi apartenas, ŝrumpas ĉiujare. Antaŭ kelkaj monatoj forpasis la verkisto Aleks KERBEL. Li estis tre bona amiko mia kaj mankas al mi persone kaj mankas al la Norda Grupo kaj al la tuta ELI (Esperanto-Ligo en Israelo). Ekde lia forpaso, ni restis nur 3 aŭ 4 maljunuloj, kiuj fidele renkontiĝas monatfine, ofte akompanataj de juna usona studento (kiam tiu ne ferias hejme kaj ne estas okupita pro ekzamenoj). Sed post 2 jaroj la junulo finos la lernadon en la Teknika Instituto de Ĥajfo, do li revenos hejmen. Li lernis Esperanton tre bone, pere de *Duolingo*. Kiam li foriros, mi verŝajne fariĝos la plej „juna” ano de la Norda Grupo (mi estas 70-jaraĝa). Do vi povas imagi la estontecon de tiu grupo... Sed Aleks KERBEL, antaŭ ol forlasi nin, zorgis, ke oni enmetu liajn verkojn en la paĝaron <verkoj.com>. Li iniciatis tiun paĝaron, kiun Amir NAOR realigis kaj nun prizorgas kaj konstante evoluigas. Aleks lasis al ni multajn trezorojn, kiujn oni povas elŭti senpage el tiu paĝaro. Indus ke ni rekomendu ĉi tie lian manlibron por memlernado „*Esperanto per 501 vortoj*”.

Laŭ mi, indus ke ni preparolu serioze la nunan situacion, t.e. la tendencojn anstataŭigi tradiciajn klasojn per senpagaj inter-retaj kursoj kaj anstataŭigi tradiciajn klubajn renkontiĝojn per virtualaj (inter-retaj) kontaktoj. Laŭ onidiroj, tiuj fenomenoj aperas ankaŭ en aliaj landoj. Mi opinias, ke la nunaj cirkonstancoj ne devus tristiĝi nin; ili simple devus pensigi nin kaj instigi nian krea adaptiĝemon.

Dialogo inter Luiza CAROL kaj Mirejo GROSJEAN – kvara parto

DEK JAROJ EN ESPERANTO-LANDO

En 2015 Luiza verkis eseon, rande de kiu Mirejo komentas aŭ faras demandojn, kiujn Luiza respondas. La unuaj partoj aperis en IPR 2016/ 2, IPR 2016/4 kaj IPR 2017/2

KIEL MI KONATIĜIS KUN LA ORIGINALA LITERATURO EN ESPERANTO

La malkovro de ĝia ekzisto perpleksigis min en 2005. Precipe por esplori ĝin, mi decidis tiam dediĉi la necesan tempon kaj energion lernante Esperanton. Mi rememoras, ke mi havis ankaŭ iom da intereso koncerne la funkciadon de la lingvo mem, sed tiu ĉi supraĵa scivolo preskaŭ elĉerpiĝis post nur kelkaj semajnoj de lernado. Plibonigi la mondon pere de lingvo en 2005... ŝajnis al mi nenio pli ol kortuŝa naiveco. Malgraŭ tio, miaj unuaj kontaktoj kun la uzantoj de Esperanto vekis mian intereson pri la Movado

kaj samtempe plifortigis mian intereson pri la kulturo de tiu komunumo. Mi iel enmergiĝis en la komunumon kaj ĝian kulturon samtempe.

En la sekvaj alineoj, mi rakontos pri la maniero laŭ kiu mi konatiĝis kun la originala literaturo de Esperanto. Miaj spertoj povos ŝajni tro personaj. Sed mi opinias, ke „tipaj spertoj” pri Esperanta literaturo... simple ne ekzistas. Ĉar legado de originala Esperanta literaturo ne estas deviga en ajna lernejo, la esperantistoj legas plej ofte laŭhazarde aŭ laŭ la rekomendoj de geamikoj, kiuj mem elektis siajn legaĵojn pli-malpli laŭhazarde. Mi ne kritikis tion. Multaj homoj inklinas malŝati dum sia tuta vivo ion ajn kion oni altrudis al ili dum la infaneco... Do iuflanke eble estas bone, ke fronte al la Esperanta literaturo oni sentas sin tute libera elekti. Sed tia hazarda legado havas ankaŭ malbonajn flankojn. I.a. oni povas seniluziiĝi post la legado de 2-3 libroj kaj perdi definitive la intereson pri tiu grava kultura fenomeno...

Miaj unuaj kontaktoj kun la originala literaturo de Esperanto okazis per interreto, dum la unuaj semajnoj de lernado. En la komenco, la programo „lernu!” proponis al mi legi po unu proverbon ĉiutage, poste ankaŭ po unu ŝercon ĉiutage. Iom post iom mi pliigis la nombron de proverboj kaj ŝercoj, kiujn mi legis ĉiutage. Mi konsideras la proverbaron de ZAMENHOF valora originala literaturo, ĉar ne temas pri nuraj tradukoj, sed pri artecaj adaptoj. Koncerne ŝercojn, mi konsideras folkloro literaturo ajnan kolekton de ŝercoj en ajna lingvo. Tiuj facilaj legaĵoj donis al mi ekde komence la fortan senton, ke la Esperanta literaturo tute ne estas „senradika”, sed „plur-radika”.

Tuj post kiam mi finis la kurseton „Bildoj kaj demandoj”, mi komencis legi la novelaron „Vere kaj fantazie” de Claude PIRON. (Oni povas konsideri ĝin moderna „plur-folkloro” rakontaro.) Ĝi estas inkluzivita en la bibliotekon de la programo „lernu!”, do mi povis legi ĝin aŭskultante la koncernajn sondosierojn kaj uzante laŭbezone la traduksistemon de „lernu!”. Intertempe, miaj novaj geamikoj donacis aŭ pruntedonis al mi amason da revuoj kaj libroj, por kuraĝigi min pri legado. Inter la printempo de 2006 kaj la printempo de 2007, mi faris per interreto la internacian kurson de Boris KOLKER, laŭ lia libro „Vojaĝo en Esperanto-lando”. Ĝi estis por mi bonega sperto, kiun mi tutkore rekomendas al aliuloj. Pere de tiu kurso mi komencis orientiĝi en la buntaj direktoj de la Esperanta kulturo. Post la fino de la kurso mem, mi trastudis atente la indeksojn de nomoj, kiun la aŭtoro aldonis al sia libro. Mi trovis en tiu laŭalfabeta indekso ne malpli ol 88 nomojn de aŭtoroj pri originala literaturo en Esperanto. Mi faris apartan liston pri tiuj aŭtoroj kaj dum la sekvaj 7 jaroj organizis miajn legaĵojn precipe laŭ tiu listo (kvankam kompreneble, mi esploris ankaŭ ekster tiu listo iomete). De kelkaj aŭtoroj mi legis nur kelkajn paĝojn, de aliaj eĉ 5-6 librojn, laŭ cirkonstancoj.

Iom post iom, la listo de 88 aŭtoroj aliformiĝis en memorhelpilon pri la originalaj Esperantaj beletraĵoj, kiujn mi legis. La laŭalfabeta aranĝo de tiu listo ne plu kontentigis min. Ankaŭ kronologia aranĝo laŭ la naskiĝjaroj de la aŭtoroj ne kontentigis min. Mi elpensis kronologian aranĝon komenciĝantan per la jaro 1887 kaj daŭranta laŭ la esperantistiĝ-jaro de ĉiu aŭtoro. En la finan version, mi enmetis inter krampojn ankaŭ la jarojn de naskiĝo (kaj eventuale de forpasoj), tiel ke oni povu sekvi kaj la „ondojn de Esperanto” kaj tiujn de la generacioj, por havi kiel eble pli akuratan spegulon de la evoluo de tiu fascina kaj unika kultura fenomeno. Ekde la fino de 2012, mi komencis pensi, ke tiu ĉi verketo povus utili ankaŭ al aliaj personoj, kiuj preparas sin esplori la Esperantan literaturon. Tial mi klopodis forviŝi el ĝi kelkajn tro personajn komentojn kaj aldoni pli da neŭtralaj informoj. Nun mi havas komentitan legoliston, kiu ampleksas 60 paĝojn A4 (kune kun fotoportretoj). Mi pretas disponigi ĝin por „lernu!” aŭ „edukado.net” aŭ alia paĝaro, laŭpete.

Mirejo: Kara Luiza! Vi faris elstaran laboron, kiu nepre utilis por aliaj personoj, kiuj volos eniri iom post iom en niajn trezorojn! Mi petas vin sendi al mi vian liston; ni volonte aperigos ĝin en nia paĝaro www.ilei.info.

Se IPR 2016/3 kaj 2016/4 ne atingis vin, se vi nepre volas posedi la plenan kolekton de nia organo Internacia Pedagogia Revuo, bv skribi al jena adreso por peti la mankantajn revuojn: ilei.officejo@googlemail.com

Bv klare skribi vian poŝtadreson kompletan.

Ni sendos al vi la mankantajn revuojn.

Kun pardonpeto pro la paneo de 2016.

Mireille GROSJEAN, prez. de ILEI

El la landoj kaj sekcioj...

Ĉinio

La libro *La danĝera lingvo* de Ulrich LINS interesis multajn legantojn, tamen eŭropaj esperantistoj mem komencas endanĝerigi Esperanton. Pli kaj pli da nekompreneblaj vortoj, kreitaj de eŭropanoj, kaj aperintaj en la revuoj

Esperanto kaj Kontakto, forte malfaciligas la Internacian lingvon. Eĉ la rubriko en la oficiala organo de TEJO estas vortumita per nekomprenebla vorto „Kontatek”. Esperanto malfacila por azianoj finfine perdis avantaĝon allogi la novan generacion, se ĝi daŭre estus endanĝerigita.

HUANG Yinbao „Trezoro”, Ĉinio
La Ondo de Esperanto, 2017-02-14

Diferencaj lingvoj kun samsento

La Dua Festivalo de Internaciaj Lingvoj en Dongfang Elementa Lernejo

Dongfang Elementa Lernejo (Orienta bazlernejo), kiu rilatas al Esperanta instruado kaj ĝemelaj lernejoj kun japana lernejo per Esperanto, situas en la ĉina urbo Changzhou inter la urbegoj Shanghai kaj Nanjing. La Esperanta fako enkondukiĝis en la lernejon antaŭ 30 jaroj, kaj ekde tiam daŭras. Nun la fako jam fariĝas deviga kurso, kio signifas, ke ĉiuj lernantoj ekde la tria klaso devas lerni Esperanton kaj en la lernejo troviĝas Esperanta societo. Ĉi-jare la lernejo havas projekton aŭspiciitan de la loka magistrato, kiu estas la studado de internacia kompreniĝo, por divastigo de ĉina tradicia kulturo, respekto de diversnaciaj kulturoj kaj diferencoj, konigo de internaciaj memorindaj datoj kaj lokaj kondiĉoj kaj moroj en la tuta mondo. Dum majo ĉi-jare la lernejo okazigis la duan festivalon de Internaciaj Lingvoj kun la temo *Diferencaj Lingvoj kun Samsento*. La komencon de majo la estrino sino Liu Lixia de la lernejo disdonis petleteron al amikoj, esperantistoj kaj konatoj de fremdlandoj kaj enlando por kolekti gratulmesaĝojn, bildojn, fotojn, filmetojn, sondosierojn de fremdlingvoj kaj dialektoj esprimantajn saluton, pacon, amikecon kaj amon. La lernejo honore ricevis multajn respondojn por subteni la festivalon, notinde el Baotalu Elementa Lernejo en ĉina urbo Zhenjiang, Baiyangshujie Elementa Lernejo en la ĉina urbo Taiyuan, Yongtai Elementa Lernejo en la ĉefurbo Beijing, Yosumi Elementa Lernejo en la urbo Takatuki de Japanio, de Józef Gašiorowski pri grupeto de polinoj en la popolaj vestaĵoj el la regiono de ŁOWICZ (ŭovjiĉ) de Pollando, s-ino Katalin Kováts, gvidintino de la pedagogia seminario en la Esperanto-centro Kvinpetalo en Francio, kaj ĉiujn nur Esperanto peras. La festivalo ankaŭ inkluzivis, ke ĉiuj lernantoj kaj instruistoj de la lernejo lernis de Brila, iu Esperanto-instruistino, dek Esperantajn frazojn kaj ekspoziciis la pentraĵojn kaj bildojn faritajn de lernantoj el ambaŭ institucioj, la lernejoj Dongfang kaj Yosumi, montrantajn pacon, amikecon kaj amon.

La 1-an de junio, internacia infana tago, okazis la fermceremonio de la festivalo. Ĉiuj lernantoj, entute 740 kiuj tenis diversajn naciflagojn, ĉeestis. La lernantoj kaj instruistoj prezentis siajn programerojn kun la temo de la

festivalo, inkluzive <infanecon de d-ro Zamenhof>, <Esperantan kanton „Jasmena floro”> kaj <Poemdeklamon „Brilo eterne restas en la Oriento”> ktp. La festivalo akiris grandan sukceson, danke al diversaj subtenoj. La lernantoj kaj instruistoj spertis kaj ĝuis la plezuratan atmosferon de la paco, amikeco kaj amo, interna ideo de E-o, kiu ĉiam restas en iliaj rememoroj kaj ĉiuj sopiras la venontan festivalon.

ZHANG Changsheng

Francio

Esperanto en Gimnazio „Victor Considerant” en Salins-les-Bains,
<http://lycee-college-considerant.fr/>

De la lerneja jaro 2015-2016, du instruistoj proponas malkovri Esperanton. Tiel kelkaj gelernantoj, 2016-maje, parolis Esperanton kun usonaj vizitantoj. Tiun jaron, ni ne plu havis la samajn kondiĉojn (pro malpliigo de la budĝeto), do ni lanĉis projekteton por tamen paroligi pri Esperanto. Tiu projekto nomiĝas „mistera lando, mistera lingvo”. Ĝi fakte estas ludo kaj konkurso. Ĉiusemajne, dum 6 semajnoj, oni proponis sur la inform-ekranoj de la gimnazio unu novan demandon pri Esperanto: ekzemple „Kiel oni ĉiam konstruas pluralon en Esperanto?” kaj unu novan indikon por trovi „misteran landon” (ekz: „Tiu lando uzas eŭron.”)



Partoprenis gelernantoj, lernejestro, kaj aliaj personoj, eĉ kuiristoj. Paralele, oni prezentis Esperanton al volontuloj, eĉ dum paŭzo de la kuiristoj. Oni instalas ligojn al lerniloj sur la interna-retejo kaj vortaron kaj librojn en la biblioteko. Oni samtempe preparis 2 lernantojn (15-jaraĝajn) por paroli Esperanton. Helpis al tiu projekto multe da malsamaj homoj (teknikistoj,

administrantoj, instruistoj, bibliotekisto, lernantoj ktp). Tio estas verŝajne unu el la plej granda sukceso. Multe da „esperontistoj” (ĉiu homo estas venonta esperantisto, ĉu ne?) pli malpli aŭdis kaj malkovris pri Esperanto. Kaj venas la ĉefpunkto... Gajnintoj de la ludo partoprenos skajp-babiladon en Esperanto kun aliaj gelernantoj el „la mistera lando”. Tio estas Slovenio. Estas la lernantoj de Peter GRBEC en elementa lernejo en Koper. Gajnintoj ricevis etajn donacojn: „Poŝlibro de Assimil: Esperanto”, vojaĝlibro pri Slovenio, kaj eĉ botelo da vino „Arbois” kun etikedo en Esperanto ktp.

Ni babiladis en Esperanto per „skajpo” mardon, la 23-an de majo je la 14a horo. (vidu lycee-college-considerant.fr/nous-avons-parle-en-esperanto/.) Eĉ juna kolemino pri la angla parolis en la angla kun slovena lernanto... Kaj Peter paroletis en la hispana kun instruistino pri la hispana.

Jes! Esperanto proksimigas homojn kaj lingvojn. Ankaŭ ĵurnalistoj estis invititaj ĉar la skajpbabilado estas parto de pli granda evento. La instruistoj pri lingvoj organizis plurajn agadojn kun la lerneja restoracio: Latina, germana, hispana, angla menuoj kun prezentoj fare de la gelernantoj. Tio okazas kadre de la „*Semajno de la lingvoj*” (el ŝtata ministerio pri edukado) kaj „*Bela monato de Eŭropo*” (el Eŭropa Unio kaj regiono Burgonjo-Franĉkonteo).

Tiel nia evento aperas en la retaj oficialaj dokumentoj kun priskribo kaj... la vorto... ESPERANTO.

Emmanuel DESBRIÈRES

Serbio

REF 2017 - Aŭtenta Esperantujo

La 39-a Renkontiĝo de Esperanto-familioj (REF) okazis inter la 21-a kaj 31-a de julio 2017 en la infana feriumejo „Rudnik” sur la montaro Rudnik en Serbio, sub aŭspicio de ILEI. Partoprenis 16 familioj, entute 48 homoj (po 24 infanoj kaj plenkreskuloj) el 14 landoj.

La varian kaj abundan programon laŭtradicie preparis kaj plenumis la REF-anoj mem, sed ankaŭ gastis loka folkloro dancgrupo kaj la esperantista aktoro Saša Pilipoviĉ kun siaj kontribuoj kaj dancigo kaj kantigo de la REF-anoj. Matena komuna kantado (repertuaro prezentita en la ĉiujare plidikiĝanta *Kantaro de REF*), atelieroj de diversaj manlaboroj, sportaj, lingvaj kaj kreaĵ ludoj ene kaj ekstere, ĉiutagaj promenoj, du tuttagaj ekskursoj, montgrimpado sur la pratempan vulkanpinton Ostrvica kun restaĵoj de mezepoka

fortikaĵo sur ĝi, antaŭdormaj „piĝamaj” rakontoj por etuloj kaj komuna laŭtlegado por la pli grandaj, diskutrondoj por la gepatroj, REF-biblioteko, diskoteko, filmprezentado – jen aŭtenta lingva komunumo de ne nur unuopuloj parolantaj la Internacian lingvon, sed de familioj uzantaj Esperanton kiel familian lingvon tuttage kaj por ĉiuj bezonoj, same kiel ĉiuj aliaj lingvaj komunumoj.



Kantrondo en REF

Tamen ne tute same kiel la nacilingvaj komunumoj. La malsameco montriĝas, ekzemple, ĉe legado. Konsiderante la modernan trouzon de komputiloj kaj poŝtelefonoj mi demandis la gepatrojn, ĉu ili kontentas pri tio, kiom iliaj infanoj legas ordinarajn librojn. „Jes nacilingve, sed ne en Esperanto”, estis la respondo. Kvankam la infanoj vivas kun Esperanto denaske kaj flue komuniĝas per ĝi, tamen ĉe legado ili ne sentas sin same komforte kun Esperanto kiel kun la gepatraj lingvoj, kiujn ili lernas en la lernejo kaj uzas surstrate aŭ sekvante televidan programon. Tamen bildstrioj en Esperanto ja estas legaĵo kiun ili volonte konsumas.

Tio ĉi emfazas la gravecon de adekvate adaptitaj legaĵoj por infanoj kaj komencantoj, kaj nesufiĉon de tiaj legaĵoj en la Esperanta literaturo. „Ĉu *Juna Amiko (JA)* povas bone plenumi tiun rolon”, mi demandis kelkajn gepatrojn dum liberaj horoj (pro la abunda programo ne eblis organizi specialan diskutrondon pri ĉi tio). Fakte kelkaj el ili unuafoje renkontis ĝin en la porokaze kaj surloke kreita „REF-biblioteko” el ŝatataj libroj

kunportitaj de REF-anoj mem, en kiun mi aldonis malnovajn kaj la plej novajn specimenojn de *JA*, *IPR* kaj aliaj publikaĵoj de ILEI.

Unuarigarde oni konstatis pli modernan grafikan aranĝon de la novaj numeroj de *JA* kompare kun la malnovaj, sed restis dubo pri la celgrupo. Se ĝi celas infanojn, denaskulojn aŭ ne, tiam la tekstoj devas esti multe pli allogaj el la infana perspektivo por emigi la infanon al legado. Gepatroj de denaskuloj diras tion laŭ siaj ĉiutagaj spertoj.

Kaj tio ne estas la sola temo pri kiu ILEI povus lerni de REF kaj fari iom pli por tiu specifa kaj potenciala celgrupo de Esperanta pedagogio.

Radojica PETROVIĆ

Al niaj 41 sekcioj

Sekcio de ILEI en iu teritorio estas ia strukturita grupo, asocio. Ĝi havu prezidanton, vic-prezidanton, sekretarion, kasiston. Plie, inter ĝiaj membroj estu sekciestro, kiu regule informas la estraron de ILEI pri la konsisto de la komitato de la sekcio, pri la membronombro, pri la pago de kotizoj. Plie, estu unu membro de la sekcio, kiu estu membro de la Komitato de ILEI, se la membraro estas sub la nombro 16. Por pli grandaj sekcioj la nombro de Komitatanoj estas du, tri, Pri la nombro de Komitatanoj bonvolu vidi la statuton kaj internan regularon de ILEI en ilei.info/dok/index.php?lingvo=eo La sekcio povas decidi, ke la prezidanto estu ankaŭ sekciestro. Ke la kasisto estu ankaŭ Komitatano de ILEI. Ke iu ne komitatano de la sekcio sed membro de la sekcio, estu Komitatano de ILEI. Pri tiaj aferoj la sekcio decidu, sed devas informi la estraron de ILEI. Plie pri la sekciestro la estraro de ILEI devas konsenti.

Vi povis observi legante tiujn klarigojn, ke mi skribis „komitatano” por membro de la komitato de la sekcio, kaj „Komitatano” por membro de la Komitato de ILEI. En la retejo de ILEI www.ilei.info estas ĉapitro INSTANCOJ kaj tie vi povas iri al sekcioj (tie aperas la sekciestroj) kaj al Komitato (tie aperas la Komitatanoj de ILEI). Bonvolu tie kontroli la donitaĵojn pri via sekcio. Kaze de malĝustaj informoj tie bonvolu informi min per la retadreso mirejo.mireille@gmail.com.

Mi finas tiun klarigan parton kun granda danko al vi pro via subteno al la Ligo.

Mireille GROSJEAN, Prez de ILEI

La Kongreso finiĝis – ek al la Kongreso

De Busano al Madrido

La ĉiujaran kulminon de sia asocia vivo ILEI atingas dum la kongreso. La jubilea 50-a kongreso, la unua sub tiu nomo post la serio de 49 konferencoj, okazinta lastjule en Busano, estis kulmina pluraspekte:

- rekorda nombro de aliĝintoj (198) kaj veraj partoprenintoj (170) kun, bedaŭrinde, ankaŭ rekorda nombro de nuligitaj aliĝoj pro vizaj problemoj kaj nestabila politika situacio ĉirkaŭ la Korea duoninsulo;
- mirinde alta nivelo de la arta programo;
- ĝuinde riĉa turisma programo ne nur ĉar la kongresa ĉeftemo rilatis al turismo kaj edukado;
- la neforgesebla etoso de ILEI-kongresoj, kiu kreiĝas ekde la akceptejo kaj interkona frandvespero, fakte daŭras kaj plu kreskas el la pasintjara renkontiĝo.

Vojmontra evento, inspira por organizantoj de la venontjara kongreso. LKK de la 51-a kongreso okazonta en Madrido, 21 - 28 julio 2018, kunvenos kun la estrarano pri kongresoj kaj laboros dum la unua semajno de septembro por definitivigi organizajn detalojn kaj startigi la aliĝadon.

La kongreso en Busano disvolviĝis en la lumo de sia ĉeftemo *Edukado al respektoplena turismo* kaj tiu aspekto same ne mankos en la turisme alloga Madrido. Tie ankaŭ la nova kongresa temo, *La kultura heredaĵo de Esperanto*, trovos fekundan grundon kaj taŭgan medion por la traktado – en la hejmlando de la *Iberia skolo*, kie landaj kongresoj de Esperanto tradicie proponas abundan kulturalan programon, en la provinco de Esperantujo kun riĉa produkto de kulturaj valoroj. Tion emfazos ankaŭ la parta koincido de la 77-a Hispana Kongreso de Esperanto (20 - 22 julio) kaj la ILEI-kongreso en la sama kongresejo, kun komuna kultura programo en la du komunaj tagoj. Tiuj kiuj aliĝos al ambaŭ kongresoj ĝuos rabatitan suman kotizon.

La kongresejon disponigos la „Colegio Mayor Universitario Chaminade” (www.cmuchaminade.com/), studenta rezidejo kun lekciejoj kaj diversaj bezonaĵoj por kulturaj, klerigaj kaj sportaj programoj. Ĝi estis fondita en 1966 de grupo celanta konstrui komunumon bazitan sur la idealoj de libereco, respondeco, respekto kaj toleremo. Fine de la semajno estos organizita karavana transiro al Lisbono por UK. Kaj post la UK, la karavano de E-eventoj en Iberio povos finiĝi aŭ en Hispanio per la IJK, aŭ en alia parto de suda Eŭropo per la SAT-kongreso en Kragujevac, Serbio, 5 - 12 aŭgusto 2018, al kiu jam eblas aliĝi per: <https://goo.gl/forms/WYttk15OQsn63rn03>.

Radojica PETROVIĆ, Estrarano pri kongresoj de ILEI

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Rob Moerbeek.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Goro Kimura, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Vítazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@tkso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsejnoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsafia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Arina Osipova**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leyster Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Rerezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr, **Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas **10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj**. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, jozefo.nemeth@gmail.com, www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, <moerbeekr@gmail.com>.

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aŭgusto 2017,
redaktofino por la sekva numero: la 31-an de oktobro 2017.**



Kurso de desegnado en REF (vd. p. 37)



Parto de LKK ricevas dankon („Merci“ en la franca) de Mirejo (vd. p. 4)



Kulturaj specifajoj de Rumanio

Mădălina Ștefănescu

Busano, 2017

Simbolo de beleco...

Ughaj prebjezo de Maramureș

